

KAJEROJ



DE JUGOSLAVIA ESPERANTO-INSTITUTO (JED) KAJ INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (ILED)

Redakta komitato: Duc Goninaz Michel, Givoje Marinko, Lapenna Emilija, Pettyn Andrzej, Sekelj Antonije (ĉefa kaj respondeca red.), Szerdahelyi István, Vanĉik Božidar; kunlaboranto: Velebit Josip.

ENHAVO

El la redakcio	1
LINGVA KONSULTEJO	
Pri la vorto „serbokroata“ — Antonije Sekelj	3
„Interkona“ vespero — Božidar Vanĉik	4
Bani kaj baniĝi — Božidar Vanĉik	4
INSTRUADO	
Teorio kaj praktiko — D-ro István Szerdahelyi	6
DISKUTOJ	
Opinio pri la unueca ekzamensistemo — Antonije Sekelj	12
NI PREZENTAS	
Andrzej Pettyn: Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto — D-ro I. Szerdahelyi	15
E. A. Bokarev: Rusa-Esperanta vortaro — Ernő Farkas	15
D-ro István Szerdahelyi: Esperanto lernolibro por 10—14 jaraĝuloj — Andreo Gauder	16
NIAJ VERKISTOJ	
Ivo Rotkviĉ — Jo-vel	17
RECENZOJ	
Kio estas recenzo? — Emilija Lapenna	19
Libro de amo — P. S.	20
Tri sovetaĵ broŝuroj (Kantoj de sovetaĵ komponistoj, Jānis Rainis, La sorto de homo) — Emilija Lapenna	21
KONCIZAJ BIOGRAFIOJ DE JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ VIII	
— Marinko Givoje	23

ABONO por Jugoslavio 10 novaj dinaroj
por aliaj landoj 2,20 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

JARKOLEKTOJ por 1963 (sen n-ro 1, sed kun n-ro 3 enhavanta ĉiujn raportojn de la Unua Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata), 1964 kaj 1965 ankoraŭ haveblaj — por la sama prezo.

MONON SENDI: Nacia banko ĉk 608-8-121-10, Jugoslavia Esperanto-Ligo, Dobrinjska 12, Beograd, Jugoslavio kun la indiko „Por Kajeroj“.

E L L A R E D A K C I O

Tutan jaron „KAJEROJ“ ne aperis. La abonintoj meritas klarigon. Jen mallonge:

En 1965 Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) faris kontrakton kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) pri komuna redaktado de „Kajeroj“ sub la kondiĉoj ke la duono de la Redakta Komitato estu el ILEI kaj 50% de la spaco apartenu al ILEI.

Ĝis la fino de 1965 ILEI ne informis pri la nomoj de siaj 3 redaktoroj, kvankam ĝi akceptis la dividon en rubrikojn, proponitan de la ĉefredaktoro. Komence de 1966 estis trovita unu el la 3 redaktoroj, kiu tuj sendis materialon. La alia estas trovita poste, sed li ĝis nun nenion sendis. La tria estas trovita apenaŭ en aŭgusto dum la Universala Kongreso, sed ĝis nun ankaŭ li nenion alsendis.

La ĉefredaktoro deziris ke la unua komuna numero estu modela, havante ĉiujn rubrikojn pri kiuj oni konsentis, ĉar JEL faris la kontrakton por plivastigi la abonantaron, kaj tion oni povas nur per interesenhava kaj bone redaktita numero. Sen redaktoroj kaj artikoloj tion oni ne povas fari. Pro tio estas decidite la aperigon de la komuna revuo komenci per la jaro 1967, kaj la abonotizo pagita por 1966 validu por 1967.

Kaj nun pri la nova fizionomio de nia revuo.

Ĝis nun la revuo havis 4 rubrikojn, por ĉiu sekcio de Jugoslavia Esperanto-Instituto (JEI) po unu: lingvistiko, instruado, literaturo, historio. Nun la dua rubriko forfalas, anstataŭ ĝi ILEI havos tri rubrikojn: 1) elstaraj traktatoj de plej eminentaj pedagogoj (ĉefe tradukoj el la nacilingvaj fakrevuoj); 2) Instruado de Esperanto kaj aliaj, ĝeneralaj pedagogiaj artikoloj de esperantistoj; 3) Lerniloj (lernolibroj, vortaroj ktp. — prezentadoj kaj recenzoj).

Sed ni prezentos la rubrikojn laŭvice.

1) La lingvistika rubriko okupiĝos ĉefe pri problemoj kiuj aperas pro la diferencoj inter Esperanto kaj la naciaj lingvoj de Jugoslavio. Kompreneble, ankaŭ alispecaj artikoloj trovos sian lokon en Kajeroj, se ili estas populare prezentitaj, ĉar alte sciencaj lingvaj artikoloj aperas en aliaj, pure filologiaj revuoj (ekz. Esperantologio). Nia revuo devas esti komprenebla por ĉiu iom pli evoluinta esperantisto. Tiun rubrikon redaktas Josip Vanĉik, Javno tužilaštvo, Varaždin, Jugoslavio.

2) Elstaraj pedagogiaj traktatoj de plej eminentaj fakuloj, principe prenitaj kaj tradukitaj el la nacilingvaj fakrevuoj (precipe ne el „mondlingvoj“, ĉar ilin multaj rekte komprenas, aŭ la nacilingvaj fakrevuoj rekte transprenas). Ni deziras kolekti kunlaborantojn (po unu el ĉiu lando) kiuj sekvos la fakajn revuojn, bultenojn k.s. de sia lando, elektas la artikolojn internacie interesajn kaj signifajn, tradukas en Esperanton kaj sendas al la redaktoro de tiu

rubriko, s-ro Michel Duc Goninaz, 28, rue Pierre-Altmeier, BEZONS (95), Francujo.

Krom tio la samaj kunlaborantoj tradukados la aperintajn artikolojn el tiu rubriko en sian lingvon kaj proponos aperigon al siaj nacilingvaj fakrevuoj ĉiam postulante ke oni menciu la fonton kaj lingvon el kiu ili estas tradukitaj. Tiamaniere oni iom post iom al kutimiĝos al la servoj de Esperanto por la fakaj celoj de pedagogoj. Aliflanke ni devas atingi ke tiun servon oni pagu same kiel ĉiun alian. Do, ne atendante aperon de la unua tiuspeca artikolo, anoncu sin pedagogoj por kunlaboro. En ĉi tiu n-ro tiu rubriko ankoraŭ mankas.

3) Instruado de Esperanto kaj ĝeneralaj pedagogiaj artikoloj de esperantistoj originale verkitaj en Esperanto. Redaktoro s-ro Andrzej Pettyn (pro manko de lia adreso bonvolu sendi la artikolojn al) Pola Esperanto-Asocio, Nowy Swiat 27, VARSOVIO, Pollando.

4) Lerniloj por Esperanto (lernolibroj, vortaroj kaj aliaj helpiloj) prezentado, recenzado ktp. Redaktoro D-ro István Szerdahelyi, Szigetvári u. 22. BUDAPEST VIII., Hungario.

5) Literatura rubriko servas unuavice por prepari el tiu objekto la jugoslaviajn kandidatojn por pli altaj ekzamenoj. Nome, ili aliloke povas trovi informojn pri ĉiuj literaturistoj, nur pri la jugoslaviaj ne, kaj ili devas koni ankaŭ la jugoslaviajn verkistojn. Krom tio ĉi tie devas aperi ankaŭ recenzoj pri novaj literaturaĵoj el la tuta mondo.

Artikolojn pri jugoslaviaj esperantistaj verkistoj oni sendu al s-ro Josip Velebit, gimnazio, VRBOVEC kraj Zagreba, Jugoslavio, kaj la recenzojn de literaturaĵoj al s-ino Emilija Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio, redaktorio de la rubriko.

6) La historia rubriko celas doni informojn pri la movado en Jugoslavio ankaŭ por tiuj kiuj preparas sin por pli superaj ekzamenoj kaj ne povas aliloke trovi materialon. La redaktoro estas s-ro Marinko Gjivoje, II. Armije 21, ZAGREBAČKA DUBRAVA, p.p. 25, Jugoslavio.

* * *

La redakcio petas ĉiujn kunlaborantojn la kontribuaĵojn sendi al la redaktoro de la koncerna rubriko, ne al la ĉefredaktoro, ĉar per tio oni devigas lin elspezi tempon kaj monon por repaki, reafranki kaj plusendi al la koncerna redaktoro. Oni ne atendu per sendado de nova materialo la aperon de la antaŭa, ĉar la redaktoroj elektos inter la alvenintaj artikoloj la plej taŭgajn. zorgante pri la diverseco kaj pri la spaco je dispono. Ne ĉio aperos kaj ne ĉio tuĵ en la sekvanta numero.

KAJEROJ estas nenies organo, do ĝi ne aperigas organizajn informojn aŭ ian ajn aktualaĵon kiu post 3 monatoj jam ne valoras. Ni deziras ke KAJEROJ estu konstanta valorajo, same kiel la ĝisnunaj 3 jarkolektoj estas absolute aktualaj ankaŭ hodiaŭ.

L I N G V A K O N S U L T E J O

PRI LA VORTO „SERBOKROATA“

Du nacioj: la serboj kaj kroatoj parolas la saman lingvon. (Tio estas tre simpligita aserto, ĉar la montenegranoj ankaŭ parolas la saman lingvon, krome, diferencoj ekzistas ne nur inter la serboj kaj kroatoj, sed inter diversaj regionoj de unu kaj alia nacioj. Tamen nian temon tio ne influas, do ni restu ĉe la unua konstato.)

La plej fruaj jugoslaviaj esperantistoj, konante la alilingvajn esprimojn: la anglan „serbocroatian“, la francan „serbocroate“, germanan „serbokroatisch“, kaj eble ankaŭ aliajn, senhezite eknomis tiun lingvon ankaŭ en Esperanto „serbokroata“ — kaj ili kun siaj disĉiploj ankoraŭ nun tute normale uzas tiun nomon, kaj neniu venas eĉ al la penso esplori ĉu ĝi estas korekta aŭ ne. La apero de la Plena Gramatiko ne vekis specialan intereson analizi tiun vorton, des pli ĉar en ĝi estas multaj ekzemploj kie la flankelemento pro belsoneco ricevas la vokalon „o“; eĉ pli: se la ĉefelemento (la dekstra) estas adjektivo, ĝi substantivigas la flankelementon (la maldekstran). Do, ĉio estas en ordo.

Sed nur ŝajne, la Plena Gramatiko parolas pri ĉefelemento kaj flankelemento, sed ĉi tie estas du samrangaj, egalrajtaj elementoj: du nacioj havas komunan lingvon, kiu el la nacinomoj estu la „ĉefelemento“ kaj kiu la „flankelemento“? Esperanto ne rajtas altrudi ĉefecon aŭ flankecon al iu ajn el ili. Konkludo: ni ne povas kunmeti vorton laŭ la reguloj de PG el tiuj du elementoj. La lingvo fakte estas **serba-kroata** same kiel la jugoslavia standardo estas blua-blanka-ruĝa, el kiuj koloroj neniu estas „ĉefa“ aŭ „flanka“. Tamen, mi neniam aŭdis ke iu diris bluoblankoruĝa. Samtiel ni ne rajtas diri serbokroata (serbo ja estas homo!). Lastatempe oni ĉiam pli ofte uzas ankaŭ la nomon „hrvatsko-srpski“ kiu laŭ la sama malnova logiko devus esti „kroatoserba“, kvankam tiu nova vorto pli emfazas ĝuste la vorton „kroata“. Ni ankaŭ nun devas veni al la konkludo ke la plej bona solvo estas **kroata-serba**, resp. serba-kroata, laŭ tio ĉu la serba aŭ la kroata parolmaniero dominas — kaj tiu kiu dominas **estas sur** la unua loko.

Ĝis ĉi tie estus ĉio en ordo, sed kion fari ĉe titoloj de vortaroj, ekz. de la serba-kroata kaj Esperanta lingvoj? Ĉu ni nomu la vortaron serba-kroata-Esperanta? Ĝi donus la impreson de trilingveco, same kiel franca-germana-rusa. Tio, do, ne taŭgas. Laŭ nia opinio la lingvo kiun parolas la serboj kaj kroatoj estas serbkroata (aŭ kroatserba) lingvo kaj la menciita vortaro **Serbkroata Esperanta vortaro**. La vorto „serbkroata“ ne estas kunmetita vorto laŭ la reguloj de PG, ĉar ĝi ne havas ĉef- kaj flankelementojn, sed devas esti konsiderata **radikvorto**, kiel aparta nocio. Nome la serbkroata lingvo ne estas lingvo kunmetita el serba kaj kroata, sed estas unusola origina lingvo uzata de du nacioj el kiuj neniu povas ĝin konsideri nur sia aŭ unuavice sia.

Serbokroata estas tutcerte erara vorto kaj ni devas ĝin eljeti el la uzo, kaj pli taŭgan anstataŭan mi ne povas trovi ol **serbkroata**. Tamen, mi akceptas diskuton ankaŭ pri iu alia propono.

Antonije Sekelj

„INTERKONA“ VESPERO

Post la dua mondmilito, anstatŭ la natura, klara kaj belsona „**interkonatiĝa** vespero“, iu enkondukis en la universalaj Esperanto-kongresoj la esprimon „**interkona** vespero“, ĉar evidente la formo **interkonatiĝa** ŝajnis al iu tro longa, kaj li do volis „revolucie“ mallongigi ĝin, kaj tiu mallongigo disvastiĝis kiel epidemio. Sed ĉi „novaĵo“ tre ĝenas la lingvosenton de esperantistoj bone konantaj la lingvon.

Kelkaj eminentaj verkistoj de nia literaturo deziris, revoltitaj, dum la Universala kongreso de Esperanto en Parizo, en la j. 1950, skribe protesti al U.E.A. kontraŭ la formo **interkona**, sed la intenco, bedaŭrinde, dronis en la sukofoka somera varmego de la kongreso...

Por montri malĝustecon de la formo **interkona** en la signifo „interkonatiĝa“, ni analizu la signifon de ĉi vorto.

Interkona estas derivata el **interkoni**, kaj **interkoni** signifas reciproke koni sin, koni unu la alian. Analogiaj kunmetoj estas ekz. interami, intervidi, interhelpi. „Interkona vespero“ do signifas: vespero de reciproka kono. Sed la unuaj vesperoj de la Esperanto-kongreso ne estas vesperoj de reciproka kono, sed de reciproka **ekkono**. Esperantistoj kiuj antaŭe ne konis sin reciproke, fariĝas, **iĝas** unuj al la aliaj **konataj**, inter ili iĝas konateco — ili do interkonatiĝas. Tia vespero do povas esti nur interkonatiĝa vespero.

Per esprimo **interkona** en signifo **interkonatiĝa** estas do mallogike aplikita la principo de sufiĉo, ĉar laŭ la **principo de neceso**, laŭ kiu oni ne povas el-lasi la afiksojn, sen kiuj la vorto ŝanĝus sian sencon, oni neniel povas forigi el la vorto **interkonatiĝa** la sufikson **iĝ**. Laŭ la principo de sufiĉo oni povus ellasi nur la sufikson **at** kaj diri **interkoniĝa**, sed la formon **interkonatiĝa** jam fiksas la longtempa lingva tradicio, kaj, krome, ĝi estas belsona kaj, kvankam iom longa, tamen pro sia sonkonsisto, kiel multaj similaj, longaj kaj belaj italaj kaj latinaj vortoj, tre facile kaj rapide elparolebla.

Pro ĉio eksplikita, la esprimo „interkona vespero“ ne nur ŝokas la perfektajn esperantistojn, sed ankaŭ nebuligas ĉe la neperfektaj komprenon pri la Esperanta vortfarado.

Por defendi klarecon kaj logikecon de nia lingvo, ni do batalu por rekuzo, dum la kongresoj, de la logika kaj belsona **interkonatiĝo**.

Božidar Vanĉik

BANI KAJ BANIĜI

Esperanto-kongreso okazas. Estas varmega somera tago. En granda restoracio, post tagmanĝo, leviĝas de ĉe la manĝotablo nia kara verda popolo kaj multaj el tiu popolo diras: »Mi iras bani«.

Aŭdante tian frazon oni estas tentata aldiri: Vi iras bani? **Kiun** vi do iras bani? Kaj kiu bezonas ke vi banu lin? Ĉu ne estus preferinde ke vi banu vin mem, ke vi do **baniĝu**?

Bani estas transitiva verbo, kiu postulas sian objekton, iun aŭ ion, sur kiun transiras la verba ago. Kaj se mi diras nur »mi banas«, tiu senobjekta

frazo subkomprenigas iun, nemenciitan objekton, kiu ne estas identa kun subjekto de la frazo, subkomprenigas do iun kiu ne estas mi. Analogie, la frazo »mi iras bani« signifas ke mi iras bani iun kiu ne estas mi, do amikon, amikinson kaj similon, kaj ne, ke mi iras bani **min**, kaj ĝuste tion lastan volis diri la kongresanoj kiuj leviĝis de la tablo.

Se mi do volas esprimi, ke mi banos min mem, mi devas tion ankaŭ diri, mi do devas diri: Mi banos min.

Sed la frazo »mi banos min« estas iom peze elparolebla, pro la pezeco de la formo **min**. Pro tio kaj pro aliaj kaŭzoj, la lingva praktiko de Esperanto al la vortradiko **ban** aldonis sufikson **iĝ**, kiu aldonita al la transitivverba radiko donas al tiu radiko refleksivan kaj pasivan signifojn.

Frazo »La infano baniĝas« havas do du signifojn:

1. La infano banas sin (refleksiva signifo)
2. La infano estas banata (pasiva signifo).

Plej ofte el la kunteksto aŭ el la cirkonstancoj en kiuj oni parolas, oni klare komprenas kiun el la du signifoj havas la transitivverba radiko kun sufikso **iĝ**.

Se do, dum varmega tago forirante el ĉambro mi diras ke mi iras baniĝi, estas ja klare komprenebla, ke mi iras bani min, kaj aplikante vastsence la principon de sufiĉo, anstataŭ la kvarvorta peza frazo „mi iras bani min“ mi povas pli elegante diri pli facile elparoleblan kaj trivortan frazon »Mi iras baniĝi«.

Ni do eljetu el nia lingvouzo la malbonan frazon »mi iras bani« (se ni ne intencas iun alian bani!) kaj ni diradu »**mi iras baniĝi**«.

Božidar Vanĉik

I N S T R U A D O

D-ro István Szerdahelyi (Istvan Serdahelji)

TEORIO KAJ PRAKTIKO

(kelkaj aktualaj problemoj en nia movad-agado)

1. LINGVO KAJ MOVADO laŭ nia teorio estas adekvataj noc'oj. Tamen, en la praktiko, lastatempe ili pli kaj pli malproksimiĝas unu de la alia: la movado opinias esti sendependa organizaĵo kaj uzas E-n, kiel ilo de sia ekzisto. La lingvo tiamaniere fariĝas oficiala kaj traktada lingvo de iu movado kaj enfermiĝas ene de ĝiaj ekskluzivaj limoj. La organizaĵo okupiĝas ĉefe pri siaj organizaĵaj kaj administraj aferoj, disputas pri tio kiuj estu prezidanto, sekretario kaj ceteraj funkciuloj, oni balotadas, plenigas diversajn demandarojn, verkas protokolojn ktp. kaj — intertempe degeneriĝas la grava celo: la lingvokulturo mem.

Ne la **lingvo** estas jam la valormezurilo de iu ĉef-esperantisto, sed la lerteco navigadi inter la internaj intrigoj, ne la laboro kaj agado en la disvastigo de la lingvo mem kaj ĝia scienca kultivado kaj esploro gravas, sed aliaj karakteriziloj, tute fremdaj al la **lingvo** mem.

Tiamaniere — ekestis du specoj de E-istoj: la movaduloj, portantaj grandegajn insignojn, sed nur iomete konantaj la lingvon kaj preskaŭ tute ne ĝiajn celadojn; kaj la simplaj laboruloj, kiuj klopodas alproprigi kiel eble plej profunde la lingvon, verki, instrui kaj disvastigi ĝin, sed kiuj — el la supremenciitaj kialoj — ne rajtas aŭdigi sian voĉon en la movado mem.

Konkludo: a) Ni devas konscii ke Esperanto estas unue lingvo same tia, kia iu ajn alia: nek pli sankta, nek pli malsankta.

b) La movado ekzistas por la lingvo kaj ne inverse.

c) Ĝi estas internacia kultur-faktoro; servas kiel internacia interkomprenilo kaj perfekte taŭgas por plenumi ĉiujn sociajn funkciojn de la internacia lingvo.

ĉ) Sekve: la E-movado estas ekskluzive internacia **kulturmovado**: ĝi komunikas kaj konservas la kulturvaloraĵojn de la tuta homaro kaj ĝi perfekte taŭgas por tiu tasko.

2. LA PROPAGANDO

La konsekvenco de la 1. estas, ke 90% de nia propaganda agado restas ene de la organizaĵaj limoj. La periodaĵoj, ĉu nur E-lingvaj, ĉu dulingvaj, feliĉe, estas adresitaj nur al E-istoj kaj legitaj nur de ili.

(Pardonu la malicon: mi diris „feliĉe“, ĉar mia opinio, en ilia nuntempa formo ili tute ne estus bona propagando por ni, en ekster-esperanta socio.)

Due, anstataŭ mi, jen citaĵo el la letero de eminenta hungara lingvisto adresita persone al mi: „Alvenis jam la tempo, ke E. donu sciancan analizon de la lingvo al la publiko. Ŝajnas, ke la landa E-organizo, apud la propagando, tute neglektas la aferon de sciencaj analizoj“ (2-4-1963).

Trie, demando de E-ista infankuracisto: „Je la fino de hungaraj medicinaj fakrevuoj troviĝas konspektoj en la plej gravaj naciaj lingvoj kaj, paralele, en interlingva, kvankam, laŭ mia scio, Interlingva havas ĉe ni nek adeptojn, nek organizaĵojn. Kial?“

Konkludo:

a) Ni devas direkti nian propagandan agadon (strikte laŭ la spirito de Frostavalen) en la direkton de neesperantistoj, ĉefe lingvistoj kaj kompetentuloj. Mi citas la pravegajn vortojn de F. Moravec (E. II 1965, p. 26): “Hodiaŭ preskaŭ neniuj opinias, ke la vojo de la amasmovado estos venkodona aŭ eĉ bonŝanca. Ĝenerala konvinko estas, ke la vojo trans la registaroj, do unue la sciencistoj, kaj due per ili trans la politikistoj estas irenda”.

b) Ĉiu landa organizaĵo klopodu eldoni nacilingvan seriozan kaj scienvaloran periodaĵon por neesperantistoj.

3. LA LERNEJA POLITIKO

Ĝis ĝia fina solvo, la centra agadtereno de E-Movado estas kaj restas la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Ĝis nun ni starigis la demandon jene: (vidu ankaŭ la artikolon de V. Sadler: „Ĉiulfankaj progresoj sur la lerneja kampo“, E. III 1965, p. 41).

— Esperanto enhavas la plej efikajn eblecojn en la eduka laboro (pri tio detale kaj precize traktis Markarian);

Koncerne la praktikan celon:

— Esperanto estas la plej facila lingvo, tuj parolebla kaj uzebla, do en la lernejo... (nur iam eldirita, sed ĉiam subpensata)... **anstataŭ** la franca, angla, germana, hispana ktp. instruoj ĝin.

Eble la enhavo de nia lernejdirekta propagando estonte akceptos tiun formulon. Sed nuntempe, ĝi estos tro frua, taktike erara, neoportuna, eĉ danĝera.

Nuntempe la unusola irebla kaj irenda vojo estas: akceptigi E-n kiel lingva propedeŭtiko, do baza lingvo de la lerneja fremdolingvo-instruado.

La fremdolingvo instruado ĉiam baraktis kaj baraktas kun nesukceso. Mi pensas, ke mi ne troas asertante, ke la plej deficitaj laboroj el ĉiuj estas tiuj de fremdolingva instruado: laboro kun grandaj energiaj kaj materiaj investaĵoj kaj la plej minimuma rezulto. Ĉiu fremdolingvo-instruanto scias tion firme! Kaj oni ĉiam serĉas iun panaceon en formo de iu nova t.n. „metodo“ kaj atendas de ĝi miraklon. Tiu nova panaceo estas nuntempe **la strukturismo** pri kiu mi parolos pli detale sube. La celo de lerneja fremdo-lingvo instruado nuntempe estas formulita kiel eble plej praktikece: tuj paroligi la lernanton.

Ni ĉiuj bone memoras ke la celo de fremdo-lingvo instruado ne estis ĉiam tia. Ni mem, kvardekjaruloj, pene kaj ŝvite lernis la lingvojn laŭ la „gramatika-tradukiga“ metodo (esence dedukto-analiza) legante jam en la tria jaro de lernado la klasikan literaturon de la koncerna lingvo. Kaj ni bone sukcesis: ni parkere vortgalopis la gramatikajn regulojn kaj bone tradukis fragmentojn el

Corneille kaj Schiller — sed peti glason da akvo ni povis nek france, nek germane. Estis alia la instrucelo — kun adekvata instrumentado.

Nuntempe, dank al malkovro de la kibernetiko sur lingvistaj terenoj oni „inventis“ la strukturismon, kiu ebligas simpligi la gramatiko-instruadon de fremdaj lingvoj.

Nia tasko estas demonstri — kaj tio estas tre facile pruvebla — ke tiu ĉi malkovro estas tute malnova: jam en 1880-aj jaroj inventis ĝin Zamenhof, matematikigante la lingvajn fenomenojn. Tamen, oni povas riproĉi, E ne estas perfekta matematika lingvo. Jes, ankaŭ ni konscias tion. Sed ĝi estas tiagrade „matematika“ aŭ „logika“ ke ĝi restis ankoraŭ parolebla. Se iu ajn plu-matematikigus ĝin, ĝi jam ne estus parolebla!

Ankaŭ facile estas demonstrebla la preskaŭ perfekta induktebleco kaj deduktebleco de E.

(Mi diris „preskaŭ“ — el la supre jam menciitaj kialoj: La indukcio: „Ĉiu vorto, finiĝanta per -O estas substantivo“ — ne estas perfekta, ĉar:

— la propraj-neasimilitaj substantivoj ne finiĝas per -O; kaj

— estas vortoj finiĝantaj per -O kaj ne estas substantivoj, ekz. PRO).

Tamen, ni povas demonstri, ke ĉiu E-frazo en si mem jam estas frazmodelo, ke el kiu ajn E-frazo oni povas eltiri la saman frazformulon, kaj pleniĝante la frazformulojn, ni ricevas ĉiam konsekvenca la samkarakteran frazon.

Ekz. el la fraz-modelo: LA TABLO ESTAS MEBLO — ni ricevas la formulon

1 2

LA ... O ESTAS ... O.

en kiu ni povas laŭplaĉe plenigi la lokojn 1 kaj 2.

Jen kelkaj fraz-formuloj:

LA ... O estas ... A.

LA ... O ... AS (-IS, -OS) ... E.

LA ... O ... AS (-IS, -OS) ... ON.

LA ... A ... O ... AS ... AN ... ON. ktp. ktp.

Instruante E-n laŭ tiuj strukturoj la fremdolingvo-instruisto alkiutimiĝas al la nova metodo, lernante E-n la lernanto dekomence venkas la psikan baron ekparoli la lingvon.

Ni devas konkrete demonstri la didaktikan valoron de E — kiel prope-deŭtika lingvo.

Jen konkreta ekzemplo: ni prenu kiel instruendaj lingvoj tri grandajn lingvojn: franca, angla kaj rusa. Kiel gepatra lingvo ni konsideru unu latinidan: la rumanan lingvon, unu fin-ugran: la hungaran kaj unu bantuan lingvon: kiswahili.

1 2 3 4 5 6 7 8

La frazo estu: LA KATO ESTAS GRANDA MALAMIKO DE LA RATO.

1 2 3 4 5 6 7 8

F. Le chat est le grand ennemi de la rate (du rate).

1 2 3 4 5 6 7 8

A. The cat is the great enemy of the rat.

1, 2 4 5 6, 7, 8

RUS: Кот большой враг крысы.

1 2 7 8 4 5 6

H. A macska a patkány nagy ellensége.

2 1 3 4 5 6 8 7
RUM. Pisica este marele dusman al soarecelui.

2 3 5 4 6 8
KISW. Paka ni adui mkubwa wa panya.

Estas okulfrape el la supraj frazoj ke:

- a) E reduktas la gramatikan problemon al minimumo,
- b) formas facile traireblan ponton inter la gepatra kaj fremda lingvoj,
- c) sekve, plifaciligas la instruadon kaj lernadon de la fremda lingvo.

Konkludo: Ni devas nun streĉi la fortojn kaj ĉiumaniere diskonigi ĉi tiun gravegan faktan en la plej vastaj fakaj medioj:

- E kiel pontlingvo inter la gepatra kaj fremda, por akcepto kaj percepto de strukturoj;
- E kiel antaŭprepara lingvo por la tuja elformiĝo de fremdlingva parolkapablo kaj ekfunkciigo de parolmekanismo.

4. TEORIO KAJ PRAKTIKO DE E-INSTRUADO

— unueca, ellaborita, sc'ence pruvita, bedaŭrinde ĝis nun ne aperis.

La Ĉe-metodo estas bonega, sed ne ĝeneraligebla (Vidu: Esperanto kaj lernejo, Ljubljana, 1959).

Dum 70 jaroj ne aperis sistema, altnivela „Teorio kaj praktiko de E-instruado“ libroforme. Ĉu komprenebla afero? Kvankam ĉiujare aperadas sufiĉe ampleksaj E-lingvaj verkoj. Kaj eĉ ne unu inter ili ekzistas, kiun ni povus montri al niaj gekolegoj-lingvistoj, al lernejestroj kaj instruaj instancoj: jen nia gvidlibro, jen nia metodo. La broŝureto aperigita de HEA estas modesta helpilo. Ne pri tia verko ni parolas.

Ĉu la kompare ofta aperigo de belliteraturaj verkoj estas pli grava, mi dubas. Mi eĉ ne povas tute konsenti kun la konstato de E. Lapenna:

„...la esperantistaro ankoraŭ tre nekontentige apogas sian literaturon, kiu estas sendube la plej grava elemento de la kultura valoro de la internacia lingvo...“ („Nia forumo“, VI. 1961, p. 106)

La unuan parton de la frazo mi akceptas kaj perfekte komprenas, sed la duan parton nur tiam, se ĝi koncernas la literaturon ĝenerale (do entenanta sciencan, E-logian, aktualan kaj belliteraturon). Bedaŭrinde, nur malalta % de niaj belliteraturaĵoj atingas la deziratan nivelon kaj la cetera, subnivela parto detruas ankaŭ tiun pozitivan efikon, kiun kreis la unua.

Ni ne povas tro fieri kun la statistiko de nia libroeldona rikolto inter I. 1954 kaj V. 1961 (7 jaroj kaj duono).

(Vidu la artikolon de D. B. Gregor en E XI. 1961, p. 135)

	verkoj	paĝoj
belliteraturo	75	12 511
aktualaĵoj + religio	63	6 607
kulturo	27	2 808
Esperantologio	23	3 170
scienco	15	1 449

Ni komparu tiun statistikon kun la hungara libroeldonado el la jaro 1961, laŭprocente el ĉiuj eldonitaj libroj:

	E	Hung	el E
	% el ĉiuj verkoj		vidpunkto
belliteraturo	47,2 ⁰ / ₀	26,9 ⁰ / ₀	+ 20,3
aktualaĵoj	24,8 ⁰ / ₀	21,0 ⁰ / ₀	+ 3,8
kulturo	10,6 ⁰ / ₀	32,7 ⁰ / ₀	— 22,1
scienco	17,4 ⁰ / ₀	19,4 ⁰ / ₀	— 2,0

Oni povas diversmaniere analizi ĉi tiujn indikojn kaj konkludi el ili **diversajn faktojn**. Sed ĉu tio estas favora en la nuntempa situacio de E — mi dubas.

Aldone mi citas du opiniojn:

Jen la vortoj de fama hungara poeto (cetere lingvoprofesoro):

„Mi estas E-isto nur kiel lingvisto, sed mi estas kaj restas hungara poeto“. Kaj li fervore studas la lingvon kaj utiligas ĝin.

Post mia duhora diskuto kun la gvidanto de fremdlingva katedro en la Hungara Pedagogiscienca Instituto li konkludis jene:

„Mi akceptas E-n kiel baza lingvo en lernejoj, kiel pera lingvo de tradukmaŝinoj, kiel traktada lingvo de internaciaj kongresoj, sed mi neniam akceptos ĝin kiel belliteratura esprimilo.“


(Cetere, mi citis ĉi tiujn opiniojn ne pro tio, ĉar mi konsentas kun ili, nur por montri la starpunkton de diversaj kompetentuloj.)

Sed, antaŭ ol eldoni tian verkon, ni devas teorie fiksi la fundamentojn de E-instruado. Mi ne povas akcepti la starpunkton de V. Sadler, kiam li asertas, ke la Internacia Lingvo estante: „... vere unika laŭ strukturo, devas signifi, ke por ĝi necesas propraj, unikaj instrumentadoj“ (E III. 1965, p. 41). Mi sentas pli proksimaj la tezojn de J. Smykalski (E XII. 1964, p. 211). Ni ne bezonas unikan instrumentodon, ni ne devas ĝin inventi. Nia lingvo tute ne estas tia unika, kiel ni ofte pensas. La ekzemplo el punkto 4 tre klare pravas tion. Ke teorie ĝi estas nek aglutina, nek fleksia (en la periodo de strukturismo ni ne devas ortodokse priatenti tiujn klasigojn) — tio ne signifas, ke ĝi praktike ne havas ecojn, kiuj proksimigas ĝin ĉu al tiu, ĉu al alia lingvogrupo.

Ni devas konsekvence finpensi, ke:

estas ĝeneralaj instrumentodaj principoj, efikantaj dum la instruado de ĉiu studobjekto,

sekvas principoj, partikularaj, taŭgaj nur por difinita objekto-grupo, ekz. lingvoj, poste, ĉiam plikonkretiĝante laŭ la ĉeno



Laŭ tiu ĉeno ni devas konstrui nian instrumentodon, kolekti la taŭgajn elementojn, kunstarigi homogene kompaktan sistemon.

Tasko tre urĝa, tuj komencenda kaj tute ne senespera aŭ utopia se ni konsideras, ke multcentoj da E-instruantoj kaj pedagogoj oferas sian helpemon kaj kunlaboradon.

Konkludo: Dum la UK UEA anoncu internacian konkurson por la verko: Teorio kaj praktiko de E-instruado, gvidlibro de E-instruisto.

5. LA PROBLEMO DE ESPERANTO-INSTRUISTARO

estas problemo solvebla nur sur landa plano. Tamen, ĉu ni prizorgis ĝis nun la necesan studmaterialon, almenaŭ studplanon por instruista ekzameno? Tute sincere: ĉu ekzistas hodiaŭ Esperanto-instruistaro? Kion ni farus se morgaŭ la oficialaj instancoj konsentus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn? Ĉu ni estas pretaj?

Bedaŭrinde tiujn demandojn ni devas respondi nee.

Ekzistas en kelkaj landoj tre lertaj kaj vivkapablaj eksperimentoj, sed ili ne estas unuecaj kaj ne estas vaste konataj.

Unuecan, altnivelan instruistaron ni povas krei nur laŭ science ellaborita, konsekvenca, komuna plano, deviga por ĉiu lando.

Kiu kolektu la ĝisnunajn spertojn, kiu ellaboru tiun planon, kiu kunstarigu la unuecan ekzamenan materialon de la porinstruista diplomo?

Ĉu ne estas urĝa kaj ekskluziva tasko de esperantistoj instruantoj mem, de ilia organizaĵo (ILEI) kaj de UEA, pere de instrukomitatoj de aliĝintaj landaj asocioj? Sed kiam ni komencu tiun laboron? Jam hieraŭ komenci estus malfrue!

Do, ni uzu la eblecojn de la sekvaj okazintaĵoj instruistaj: la Gracan Konferencon kaj la ILEI-aranĝojn dum la 51-a UK en Budapeŝto. Estas ne nur rajto, sed devo de ĉiu Esperanto-instruisto partopreni tiun gravegan laboron.

D I S K U T O J

OPINIO PRI LA UNUECA EKZAMENSISTEMO

Kvankam mi ne partoprenis la 2-an Konferencon de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, mi post ĝi havis la okazon vidi la proponon de la Ekzamena Komitato de Hungarlanda Esperanto-Asocio pri „Regularo por la unueca ekzameno-sistemo“.

Antaŭ ol preparoli la proponitan regularon mem, mi deziras starigi kelkajn pripensindajn principajn demandojn.

a) Ĉu vere estas nepre necese egaligi en ĉiuj landoj la postulojn por la samgradaj ekzamenoj? Ĉu io simila ekzistas pri instruado de iu alia lingvo, de fiziko, geografio, gimnastiko... aŭ iu ajn studobjekto? Ne ekzistas, eĉ ekzemple en Jugoslavio ĉiu respubliko ne devas havi kaj ne havas egalan lernejan programon por la samgradaj lernejoj. Kial ĝuste por Esperanto estu rigore egala la ekzamenprogramo en ĉiu lando?

b) Eĉ se iu forumo konsiderus necesa havi absolute identan ekzamenprogramon en ĉiuj landoj, kiu estas kompetenta starigi tian programon? La hazarde ĉeestantaj personoj kiuj instruas Esperanton en iu lernejo, ne estas kompetentaj. Asocio de instruistoj (lernejaj!) estas libervola organizaĵo en kiu estas multaj kompetentuloj pri instruado (ne ĉiuj ankaŭ pri instruado de Esperanto, kiun multaj mem ne scias aŭ ne sufiĉe por esti kompetentaj), sed estas ankaŭ aliaj kies profesio ne estas instruado. Krome la principoj por instrui plenkreskulojn (la plimulton de niaj kursanoj) ne estas identaj al tiuj aplikataj en lernejoj. Iu nacia organizaĵo ne povas esti kompetenta por internacia ekzamensistemo. UEA aŭ iu ajn internacia organizaĵo ne estas fake kompetenta. Eble la Akademio, se ĝi havus tian organon.

c) Se iu organo, sendepende ĉu kompetenta aŭ ne, kreas iun internacian ekzamensistemon, kiu havas la povon devigi ĉiujn landajn asociojn akcepti kaj aplikati ĝin? Neniu, ĉar la landaj asocioj ne estas ies filioj, sed memstaraj organizaĵoj kiuj aŭ estas aŭ ne membroj de internacia organizaĵo; ĉiukaze tia obeado ne povas esti altrudata eĉ al membro de internacia organizaĵo.

Tiom principe. Kaj nun pri la programo mem.

1) Ĝi absolute respegulas la hungarian ekzamensistemon, la duŝtupan lingvoinstruadon, kun aldono de iu tria ŝtupo por kreo de specialistoj. B-diplomo aĉestas la **perfektan konon** de la lingvo, kvankam la nomo estas „mezgradada“. Do, la proponantoj per tio nenion cedis. Mi mem ne kuraĝus aliri tian B-ekzamenon, ĉar mi opinias ke mi estas ankoraŭ sufiĉe malproksime de perfekta lingvoscio, kvankam mi estas membro de komisiono por C-ekzameno, verkis kelkajn lernolibrojn, vortarojn ktp.

2) Tutlanda konstanta ekzamenkomisiono por A-ekzameno estas **granda** balasto, precipe en landoj kun pli ol 100 societoj en diversaj lokoj, ĉar tio burokratigus la aferon. A-ekzameno devas okazi post la fino de ĉiu kurso, kaj oni

ne ĉiam havas tempon kaj monon por vojaĝi. Tiu ekzameno devas resti kompetenteco de la societoj, ĉar finfine ĝi rajtigas nur al portado de la insigno.

Oni pledas pri unusola tutlanda ekzamenkomisiono por ĉiugradaj ekzamenoj. En Jugoslavio ekzistis tutlanda komisiono por C-ekzameno kaj la Jugoslavia Esperanto-Instituto post longa diskuto per plimulto da voĉoj nuligis ĝin cedante ankaŭ la plej superan, C-ekzamenon al la respublikaj institutoj. Kiel oni imagas ke la sama institucio akceptus starigi tutlandan komisionon por ĉiuj ekzamenoj, eĉ por A? Ŝajnas ke estus multe pli reale proponi ke ĉiu societo havu sian komisionon por A-ekzameno (kiu ne havas kompetentajn personojn, prunteprenu de la najbara societo aŭ de la regiona, departamenta... instanco); komisionoj por B-ekzameno devus esti en ĉiu regiono, departamento, respubliko k.s.; komuna landa komisiono devus esti nur por C-ekzameno.

3) Estas vero ke ni bezonas fakulojn pri kelkaj fakoj, sed en la listo ne estas „informantoj“ kaj „organizantoj“, kaj ĝuste en tiuj du fakoj ni forte lamas. Mi ne farus apartajn fakojn por artradukistoj, faktradukistoj, komerc-korespondantoj, ĉar ĉiujn tiujn funkciojn povas plenumi „tradukisto“, eĉ fremdulgvidanto li povas esti kiom koncernas la lingvoscion, alia afero estas ĉu li konas la vidindaĵojn kaj historion de la urbo ktp, sed tion oni ne instruas en Esperanto-kurso. (Ĉe ni oni diskutis pri tio ke la kreado de specialistoj estu 4-a, D-ŝtupo, ĉar la unuaj 3 ŝtupoj estas ĉefe lingvo-instruado.)

4) Oni al C-ekzameno devas allasi ĉiun kiu bone regas la lingvon kaj havas aliajn necesajn sciojn, sendepende kiajn lernejojn li finis, ĉar ĉi tie li ricevas diplomon nur pri la scio de Esperanto (kompreneble se la „Esperanto-instruado“ havas 3 ŝtupojn).

Por specialistoj pri instruado oni kompreneble devas postuli almenaŭ mezlernejon, sed por informantoj kaj organizantoj tio ne estas nepre necesa. Ion ja devas rajti en nia movado ankaŭ tiuj kiuj ne havis la feliĉon fini mezlernejon. Ekzistas multaj landoj en kiuj tre malmultaj finis mezlernejon, kaj estas gravaj funkciuloj ankaŭ sen ĝi.

5) Mi estas absolute kontraŭ tradukado ĉe A-ekzameno, ĉar tiu metodo estas jam arkaika. Ankaŭ hodiaŭ ekzistas lernejoj en kiuj oni fremdajn lingvojn instruas tradukante, sed post la fino de tia lernado neniu parolas la lingvon kaj oni neniam povas liberiĝi de la pensmaniero de la geparta lingvo. Tradukado estas arto, same kiel verkado, do ĝi devas resti por pli superaj ekzamenoj. Ĉe ni la skriba parto de A-ekzameno konsistas nur el unu libera temo elektebla el inter 2—3.

Ankaŭ en la buŝa parto ne devas esti tradukado. Ĝenerale dum la ekzameno oni devus aŭdi nur Esperanton. Morfologia analizado de teksto gepatralingve kaj nacilingva respondado al gramatikaj demandoj, ŝajnas esti maloportuna superŝarĝo de la kandidato, ĉar ni ne kreas gramatikistojn (multaj eĉ la propran gramatikon ne scias), sed **uzantojn de la lingvo**. Mi preferas aŭdi la kandidatojn paroli Esperante kun eraroj, ol senerare deklami gramatikajn regulojn en nacia lingvo. La infanoj unue lernas paroli, kaj nur post pluraj jaroj komencas lerni la gramatikon.

Kaj laste, mi ne povas prisilenti la postulon de deklamado de iuj poemoj. Tiu ideo evidente devenas de iu poeto aŭ poeziamanto, sed en la hodiaŭa mondo tiaj idealistoj estas malmultaj. Se iu estus de mi antaŭ 14 jaroj postulinta deklamadon, hodiaŭ mi certe ne estus esperantisto. Ankaŭ multaj aliaj. Oni ne faru ŝablonon egalan por infanoj kaj plenkreskuloj, ĉar homo kiu venis

lerni Esperanton por praktika uzo en komerco, hotelo, restoracio, ĉe giĉeto, ktp, certe ne lernos poemojn parkere. Plenkreskuloj ne ŝatas esti papagoj.

6) Ĉe B- kaj C-ekzamenoj unu el la plej bonaj manieroj kontroli la scion (aŭ pli precize: la nescion) de la kandidato estas: senerarigo de intence erarigita teksto, kiun ni dum jaroj kun bonega rezulto aplikas. Eble oni tion povus aldoni al la skriba parto alternative kun la traduka tasko, aŭ duonigi la tradukon kaj aldoni tion ĉi.

7) La faklaboraĵo elfalas el la C-ekzameno, se ĝi restos „prilingva“ ekzameno.

8) En diversaj lernejoj en la mondo ekzistas 5 aŭ 10 ŝtupoj por mezuri la scion, kial ni havu nur 3? Mi ne dirus „nebona“, sed „malbona“ aŭ „nekontentiga“, la dua ŝtupo povus esti „kontentiga“, la tria „bona“, la kvara „tre bona“, la kvina „bonega“ aŭ „eminenta“.

Ĉiu kandidato ĉe A- kaj B-ekzamenoj devus ricevi nur unu noton por la tuta ekzameno. Ĉe C-ekzameno oni jam povus doni notojn pri ĉiu unuopa studobjekto aparte kaj se iu kandidato malsukcesas el unu objekto (ne el la lingvoscio), ekz. historio, literaturo, k.s., li povu nur el tiu objekto ripeti la ekzamenon.

9) Okaze de malsukceso ĉe A-ekzameno, absolute sufiĉas 1 monato por prepari sin al nova ekzameno. Okazas ke iu post nur unumonata lernado brile faras A-ekzamenon. Ankaŭ la intervalon inter la sinsekvaj ekzamenoj oni ne devas fiksi, ĉar ne ĉiuj bezonas tiom da tempo, multaj eĉ aliras al unu ekzameno jam preparitaj aŭ preskaŭ preparitaj por la sekvanta ŝtupo.

Jen nur kelkaj pensoj pri la, cetere, tre pedante ellaborita propono de Unueca Ekzameno-Sistemo, kiuj montras ĝian neakcepteblecon. Se oni deziras krei iun internacie validan ekzamensistemon, la procedo, laŭ mia opinio, devus esti jena:

1) Trastudi la ekzistantajn ekzamensistemojn de ĉiuj landoj.

2) Rigestri ĉion kio estas egala en ĉiuj aŭ en la plejmulto de la ekzamensistemoj.

3) Internacia komisiono de kompetentuloj (ne el unu lando kaj ne el unu fakorganizaĵo, sed el ĉiu lando unu persono kiun elektas la plej kompetenta forumo — precipe Instituto kie ĝi ekzistas; unu reprezentanto de la Akademio kaj unu de ILEI) kunvenu kaj redaktu la regularon nur en ĉeftraĵoj akcepteblaj por ĉiu lando. Nenian detalon (konsisto de ekzamenkomisiono, formo de diplomoj, temaro por diversaj ŝtupoj ktp) oni altrudu, ĉar ili povas resti diversaj en diversaj landoj.

4) Prezenti al ĉiuj landoj kaj peti la akcepton de la Regularo.

Ĉiu alia procedo verŝajne ne povas sukcesi.

A. Sekelj

N I P R E Z E N T A S

Andrzej Pettyn: Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto, Pola Esperanto Asocio, Filio en Varsovio, 1965.

La serioza literaturo koncernanta la instrumentodon de Esperanto estas tiel malriĉa, ke ni devas ĝoje bonvenigi ĉiun verkon, kiu kompletigas tiun kulpan mankon de la Esperantista instruistaro.

Des pli ĝojiga fakto estas, ke — bedaŭrinde nur sporade — ekzistas esperantistaj pedagogoj, kiuj kuraĝas eksperimenti, esplori novajn vojojn, por plibonigi kaj plifaciligi la lingvoinstruan laboron.

La recenzata verko, kvankam tre modesta kaj entute 27 paĝa, entenas valoregajn teoriajn pensojn kaj praktikajn konsilojn.

La **strukturisma** koncepto (laŭ ni estas pli ĝusta tiu nomo ol „struktura“) enpenetris en la lingvosciencan dank' al la malkovroj de kibernetikistoj, pli proksime, de matematikaj lingvistoj. Esence ĝi estas **lingvo-modeligo**. Kaj se niaj kolegoj, instruistoj de naturaj fremdaj lingvoj pene kaj ŝvite scipovas kunstarigi sistemon de bazaj fraz-strukturoj (kun aro da subvariantoj — sekve de la neregulaĵoj kaj esceptoj de koncerna gramatiko) — kial ne solvi la problemon en la kadro de nia lingvo, kiu en si mem estas regula kaj **sinteza modelo** (t.n. „makromodelo“) de la lingvoj („lingvo“ en semiotika senco de la vorto), ĝenerale — kaj kompakta sistemo de mikromodeloj — speciale. Ĝuste la strukturismo povas plej brile demonstri la superecon de Esperanto kompare al ĉiu alia lingvo el la vidpunkto de ĝia instruebleco. Eble pere de la strukturismo ni povos plej facile komprenigi la nerifuteblan valoron de Esperanto, kiel propedeŭtika (baza) lingvo en la lerneja instruado.

Se la broŝuro de A. PETTYN vekos ankaŭ en aliaj kolegoj la samajn pensojn kiel en mi, aŭ ĝi rezultos la priatentigon de esperantistaj kaj neesperantistaj pedagogoj pri tiuj faktoj — ĝi jam atingis sian celon kaj faris tre valoran servon por la Internacia Lingvo.

D-ro Istán Szerdahelyi

Rusa-Esperanta vortaro, red. E.A. Bokarev. Eld. „Soveta Enciklopedio“, Moskvo, 1966. 536 p. 17 × 11 bind. Prezo: 1 rublo 2 kopekoj.

Ĉar mi jam iomete gustumis la ekscite interesan laboron de leksikografio, eble mi povas pli ĝuste aprezi la grandsignifan eventon, kiun la apero de la nova vortaro signifas por la ruse parolantaj samideanoj. Sed eventon signifas ĝia apero ankaŭ pro tio, ĉar la lasta uzebla **I. Izgur — V. Kolĉinski: Granda Rus-Esperanta Vortaro** aperis en 1933, kiu iĝis malofta, preskaŭ muzea objekto. Do mi ne povas pridubi la ĝojon sinceran kaj dankon de niaj rusaj samideanoj, ke ili nun havas modernan kaj ampleksan vortaron. Pro ĝia zorga kaj faka ellaboro, aperigo, klara preso, bindita plaĉa aspekto la kolektivo de kompilintoj, la eldonejo, la teknikaj aranĝintoj meritas varmajn dankon kaj gratulon.

Rimarkinda, eĉ laŭdinda estas, ke la rusaj vortoj havas akcentsignon, ĝi estas tre grava por ni, kiuj nur lernis aŭ studos la rusan lingvon. La ampleksa vortaro kun siaj 24.000 vortoj enhavas konsiderindan nombron da fakaj vortoj. Tre plaĉas al mi, ke ofte la vortoj estas eksplikataj per sinonimoj, apartaj klarigoj. Oni trovas en ĝi parolturnojn, ĉiutage uzatajn esprimojn. El inter ili jen kelkaj: ĝisekstreme plena; cirkulas la famo, onidiro; vidi ĝisfunde iun; unu fojon por ĉiam; en la sino de la naturo; trafi el la fajro sub flamon = trafi el sub pluvo en riveron; ŝajnigi gravan mienon = afektj gravan mienon; mi kraĉas al tio = mi ignoras tion; mi povas ilin kalkuli laŭ miaj fingroj; kiu ĉasas du leporojn kaptas nenium ktp. Suplemente la vortaro enhavas la plej gravajn geografiajn nomojn en la plej uzataj Esperanto-formoj.

La vortaro aperis en 50.000 ekzempleroj, sed ni forte esperas ke ĝi tre baldaŭ elĉerpiĝos. Ni estas konvinkitaj, kiam la eldonejo „Soveta Enciklopedio“ per tiu ĉi gratulinda eldonaĵo ekiris novan vojon, ĝi daŭrigos la Esperanto-eldonojn kun multaj aliaj simile laŭdindaj Esperanto-verkoj.

Ernő J. Farkas (Farkaš) Hungarujo

D-ro István Szerdahelyi: Esperanto lernolibro por 10-14 jaraĝuloj, Hungara ŝtata eldonejo de lernolibroj, Budapeŝto, 1965, 212 p.

Ne nur la hungara, sed ankaŭ la internacia esperantistaro akceptis kun granda ĝojo la plej novan hungaran Esperanto-libron de d-ro István Szerdahelyi. kiu aperis je la fino de 1965.

La moderna, novmetoda lernolibro meritas nian specialan atenton. La libro konsistas el 2 ĉefpartoj. En la unua ĉefparto troviĝas 24 lecionoj planitaj por 2 jaroj. Tio ŝajnas esti reala plano, ĉar la entenataj mil vortoj estas ellerneblaj dum tiu periodo.

La unua lernoĵaro enhavas nur esperantajn tekstojn en 12 lecionoj sur 82 paĝoj.

La dua lernoĵaro havas dulingvajn tekstojn, ekplikaĵojn, ekzercojn en 12 lecionoj sur 55 paĝoj. Kun siaj 55 paĝoj la dua parto ŝajnas esti ne proporcia komparante ĝin kun la 82 paĝa unua parto. Aparte je la fino de la libro — en la dua ĉefparto — ni trovas la gramatikon kaj nur esperant-hungaran vortaron.

La aŭtoro majstre solvis la unulingvecon de la unua parto, ĉar la gramatikaĵoj troviĝas sur la marĝeno. Tio ebligas la facilan trarigardon de la gramatiko de la unuopaj lecionoj kaj helpas en la planado de la studhoroj.

La materialo de la unua jaro formas unuecon. Post trastudado la lernanto povas fari simplajn konversaciojn. En 2 instruhoroj semajne oni povas trastudi la materialon dum unu lernoĵaro.

En la duajara programo troviĝas la ne gravaj sufiksoj, la partecipoj kaj la kunmetitaj tempoj.

Grandvalora estas en la libro la unulingveco, en kies solvo la aŭtoron helpis multaj ilustraĵoj. Spritaj didaktikaj solvoj, interesaj historietoj, vidaj gramatikaj ekzercoj kaj lerta semantiko karakterizas la libron. Je la fino de la lecionoj ni trovas koncentrite evoluigantan konversacian materialon kaj korespondajn modelojn. Abunda ekzerca materialo estas je dispono de la instruanto.

La veraj valoroj kaj difektoj de la lernolibro evidentiĝas nur tiam, kiam oni ĝin instruas. Mi jam trastudadis kelkajn lecionojn kun miaj gelernantoj. Ni konstatis, ke la demandaj pronomoj „kiu, kio, kia“ jam en la unua leciono estas maksimalismo kaj kaŭzas malhelpaĵon al la lernantoj. Ili ĉiam miksas ĉi tiujn formojn. La aŭtoro estus devinta prilabori tiujn formojn proporcie en pluraj lecionoj.

En la retraduka materilao (fremdlingven) de la unua leciono (p. 141 supre) konfuzon kaŭzas la hungara frazo „aŭstrala knabino kaj aŭstra knabo“. La du vortoj (aŭstrala-aŭstria) estas sufiĉe samformaj kaj la lernantojn ĉiam konfuzas la du vortoj, ĉar „aŭstrala“ ne signifas nur popolon, sed ankaŭ kontinenton kaj en la „aŭstria“ vorto ili ne sentas la landon pro tio ili ĉiam diras „aŭstra“ anstataŭ „aŭstria“. Tiuj estas nur difekteroj, kiujn lerta instruisto tuj korektas kaj anstataŭas per aliaj formoj.

Kvankam la libro estas destinita al geknaboj inter 10 kaj 14 jaroj, ĝin ankaŭ plenkreskuloj bonege povas uzi. La plenkreskulo pli facile kaptas la problemojn kaj la ĝojo de la sukceso plivigliĝas la laborvolon.

La kovrilo de la libro estas belaspekta, la ilustraĵoj spritaj kaj vidaj. Bona papero, klara preso, facile ellerneblaj kantetoj, tre taŭgaj vidaj bildoj (la sezonoj, partoj de la tago, „indianaj skribo-signoj“, parencara tabulo, fabeletoj, tre uzablaj bildoj por ekpliki la sufiksojn, la kunmetitajn vortojn), mallongigoj ktp. riĉigas la libron.

Gravengan problemon mi volas mencii. Tiun ĉi libron oni devus „esperantigi“; tio estas, la hungaran tekston traduki Esperanten, eĉ „nacilingvigi“ tio estas, la hungarajn tekstojn traduki en naciajn lingvojn (anglan francan, rusan, germanan ktp.) por ke ankaŭ alinacianoj povu ĝin uzi plej baldaŭ.

Apartan dankon meritas la Hungara Ŝtata Eldonejo de Lernolibroj pro la belforma, bontipografia, riĉe ilustrita, elstara eldono.

Andreo Gauder (Hungarujo)

N I A J V E R K I S T O J

I V O R O T K V I Ć

Ĉi-jare, kiam Esperanto atingas la 80-an jaron de sia ekzisto, la tutmonda esperantistaro kun ĝojo povas konstati, ke krom multaj verkistoj, kiuj skribas originalajn verkojn, la Esperanta literaturo posedas **sufiĉe grandan nombron** da elstaraj tradukantoj, kiuj, kune kun nia Majstro, ankaŭ ebligis la pli rapidan evoluon de Esperanto.

Tiun nombron de menciindaj tradukantoj konsistigas ankaŭ la jugoslavia esperantisto Ivo Rotkvić, konata ekster la limoj de sia lando pro siaj kongresaj festparoladoj kaj literatura verkado.

En la tempo inter la du mondmilitoj Rotkvić (naskiĝis en la j. 1901) tre aktive partoprenis la jugoslavian Esperanto-movadon, plenumante, interalie, diversajn funkciojn kiel komitatano de la Esperanto-societo en Zagreb. Dum longaj jaroj estis nelacigebla redaktoro de esp. revuoj kaj lerta kursgvidanto. Krom tio kun dro D. Maruzzi verkis bonan kroata-esperantan vortaron.

Multaj partoprenintoj da niaj internaciaj kongresoj memoras lin kiel belstilan oratoron. Tamen, lian plej gravan okupon prezentas la tradukado de beletraj verkoj en Esperanton.

En la jaro 1934 la Budapeŝta revuo Literatura Mondo eldonis lian tradukon de la romano „Cezaro“, kiun originale verkis Mirko Jeluŝiĉ. Tiu traduko signalis, ke aperis „kuraĝa tornisto“ de nia literatura lingvo, kiel dirus Kalocsay.

Rotkvić en siaj tradukoj surprizas per sia eksterordinara vortfarado. Certagrade li daŭrigas la vojon de Grabowski, tiu granda vortomajstro en la komenca evoluo de Esperanto.

Rotkvić tra la tuta verko lerte aplikas la senperan verbigon de substantivoj kaj adjektivoj, la kuraĝan vortkunmetojn kaj la tre larĝan uzon de adverboj. Dank' al sia vere sorĉa komponado, li sukcesas, laŭbezzone mallongigi la frazon kaj ricevi tre fluan kaj vivecan frazritmon.

Por prezenti la stilon de Rotkvić, unue mi citos kelkajn frazojn el „Cezaro“ kaj poste el la verketo „Tragedio en la Universo“, kiun ankaŭ la sama aŭtoro tradukis. Aŭtoroco de la verko apartenas al grupeto de l' junaj zagrebaj astronomoj-esperantistoj:

„Li urs-paŝas apud la du-rada bovoveturileto“. — „Li ĉirkaŭ-saltas, ridgargas“. „Bojege ekfuriozas hundo el sia dometo, rompstreĉante la pintan ĉenon“. — „De la putorando saltas granda, blanka kato, kiu tie sunĝuis. Kokinoj dispafiĝas en kapturna timo, grupeto da anasoj indigne leviĝas, dum kelke da anseroj flugilante ekinsultas“.

Kaj jen, la fragmentoj el „Tragedio en la Universo“:

„Tamen, multe, diras la scienculo kapjesante faksperte. Ĉi tiuj estaĵoj ja, ĝuste en la tempo, kiam la jena duopo gapvagaĉis sur nia planedo, ekalkovris la atoman energion. Vere, ili malkovris la eblon fruktuzi ĝin etkvante, nur 1-procente, sed eĉ surbaze de tiu malkovro ili povis vivi fabelbrile — utiligante tiel la gigantan energion kun justa socia distribuo kaj laŭplana organizado ili ne devus labori pli ol du horojn tage kaj, laŭproverbe, paradizumi en mielo kaj lakto“.

Ia romano „Cezaro“ ĝenerale estis bone akceptita de la kritiko kaj de tiu parto de la esp. legantaro, kiu kapablas senti la vortomajstrecon de la tradukinto. Degenkamp, unu el la pli severaj recenzistoj, kiuj sinokupis pri la verko de Rotkviĉ, en la libro „Esperanto 60-jara“ (Amsterdam, 1947) rekonas la valoron de la menciita traduko. En la enkonduko de sia lingvostuda verko li sendetene deklaras, ke Rotkviĉ „sciis uzi la lingvon en senco plej moderna, utiligante ĉiujn eblojn, kiujn Esperanto mem prezentas“. Kaj kelkajn paĝojn pli poste (p. 35) prezentante la ĉefkarakterizojn de „Cezaro“, li faras ankaŭ certajn riproĉojn, sed liaj finkonkludoj koncerne la verkon estas pozitivaj. Elstarigante la grandan diferencan inter la unua pionira provo (farita de A. Grabowski per „La Neĝa Blovado“ de A. Puŝkin) kaj la dua (de Rotkviĉ) „efektiva kvazaŭ eksperimente por pruvi, kion Esperanto povas „realigi“, li konstatas, ke „malgraŭ la granda diferenco, la nuna esperantisto same facile legas la unuan provon kiel la duan artaĵon“. Fine li kun ĝojo konkludas „ke „ĝi estas evoluo pri kiu ni prave povas fieri“.

Krom la cititaj verkoj Rotkviĉ tradukis ankoraŭ kelkajn pli malgrandajn prozajn verkojn de jugoslaviaj verkistoj Milan Ogrizoviĉ, Fran Majuraniĉ k.a. kiuj estas ĉu dissemitaj en diversaj esp. revuoj kaj gazetoj, ĉu presitaj en libroformo. Apartan atenton meritas la poeziaj tradukoj de Rotkviĉ, ankaŭ en la periodo inter la du militoj, precipe la tradukoj de kelkaj baladeskaj motivoj el la poezio de Mitroviĉ, Domjaniĉ kaj Vidriĉ, kiuj ankaŭ pravas la delikatsentan, unuarangan verkiston. Rotkviĉ ankoraŭ ĉiam verkas kaj, laŭ la ricevita informoj, li baldaŭ surprizos nian movadon ankaŭ per originale verkita prozaĵo en sia bone konata, majstra stilo.

Jo-vel

R E C E N Z O J

KIO ESTAS RECENZO?

Senkrajone registritaj notoj konceptitaj aŭskultinte diskuton ĉe la konferenco de la redakta kolektivo de KAJEROJ en marto 1966.

I — Laŭ PLENA VORTARO: Recenzi: Fari en gazeto mallongan kritikan raporton pri iu verko, spektaklo aŭ ludo, montrante la kvalitojn kaj mankojn.

II — Ekzakta difino, kio estas recenzo, preskaŭ ne ekzistas.

III — La praktiko montris kio estas recenzo, legu la nacilingvajjn publikajojn.

IV — Recenzo en la formo de gramatika-stila analizo malaperis de sur la paĝoj de literaturaj revuoj kaj literaturaj partoj en gazetoj. Nun la recenzo estas eseostila prezento de la verko esprimita en literaturaj lingvo, stilo kaj formo.

V — Gramatikaj-stilaj analizoj de unuopaj verkoj tamen ekzistas, sed presataj en fakaj revuoj kaj aperintaj sub la titolo „recenzo“. Recenzanto esisto pli tuŝas la lingvan elementon nur se tiu pro io aparte elstariĝas: nekutime brila beleco aŭ nekutime truda fuŝeco.

VI — Kiel diferenci la bonan disde malbona recenzo? Same kiel veran artaĵon disde diletantaĵo. La principoj de la bona recenzado estis pristuditaj kaj publikigitaj en tiuj du-tri artikoloj, kiuj entute ĝis nun traktis tiun temon. Niaj redaktoroj devus koni ilin.

VII — Ankaŭ gimnazianoj en siaj hejmaj taskoj faras recenzojn pri la legitaj verkoj. Kial recenzo en tiu stilo ne estas bona? Ĉar revuoj kaj gazetoj ne estas kajeroj por hejmaj taskoj de gimnazianoj.

VIII — Unu el la postuloj pri la bona recenzo estas mallongeco. Kiel eblas en kelkaj ĉapitroj prezenti la enhavon, karakteron, lingvon kaj tipografian aspekton de unu verko? Mallongecon postulas la spacomanko en niaj gazetoj, ne la karaktero de la recenzo. Eĉ en kelkaj linioj eblas trafe prezenti la verkon kondiĉe ke la recenzisto posedu rutinon, talenton kaj kapablon verki recenzojn.

IX — Kial rerakonto de la enhavo estas konsiderata nebona recenzo? Rerakonto de la enhavo estas la plej tipa mezlerneja tasko. Recenzisto prezentas esencon de la enhavo, ĝian kernon, ne unuopajn personojn kaj okazaĵojn el la subjekto.

X — Kia estas la lej malbona tipo de recenzo? Tia, kiu asertas sen argumentoj, konstatas kun malcerteco, analizas malgravaĵojn, kovras la paĝospacon per multaj frazoj sen enhavo, rerakontas la subjekton en malpli longa formo, ne kuraĝas kondamni fuŝaĵojn kaj laŭdi valoraĵojn.

Ĉio tio estas kvazaŭ dek bibliaj kanonoj. La agadkampo pri recenzado estas tiom neprilaborita ke ne dek sed cent kanonoj ne pritraktus ĉion, kio tiukampe aperas. Kritikistoj en la naciaj literaturoj okupas multe pli gravan

lokoni ol en la Esperanta. Niaj redaktoroj, eĉ de literaturaj revuoj, opinas ĉiun sciantan kunkudri iom pli belvorte du-tri frazojn, kapabla verki recenzojn. La kontraŭa opinio restis ĝis nun vekrio en dezerto. Kiom longe daŭros tiu stato?

Emilija Lapenna

LIBRO DE AMO. Je la ŝildanonco de „L'akacio“. Byblos MCMLXIX. Antaŭparolo de Arieh ben Guni.

La ĉastafektaj esperantistoj tuj forĵetu tiun ĉi libron, por sin retiri al sia „d ka ŝel' testuda“. Tute simple dediĉita „al gefianĉoj kaj junaj geedzoj por instruo kaj instigo“, ĝi tute ne estas altruda. Se ili indigniĝos kaj grumblos pro ĝia misinflua efiko, neniu ja ilin devig's legi.

Sed tiuj kiuj legis almenaŭ la Sanktan Skribon, neniel forĵetu ĝin; nenium mortigos nervo-ŝoko: tiu ĉi ampoez'a libro ne estas pli danĝera ol la Kanto de la Kantoj, ĝi nur sekvas la miljaran tradicion de Egiptujo, Helenujo, Romo, Ĉinujo. Kelkaj el la plej valoraj pecoj de la antikva erotika poezio kompletigitaj per la plej ĉarmaj ekzemploj de la francaj, anglaj kaj hispanaj heredintoj de tiu eterne viva fluo, estas kolektitaj en la majstre tradukita „Sekreta antologio“.

La „Sekretaj Sonetoj“ de Peter Peneter, enkondukitaj per abudaj motoj (Sankta Paŭlo, Omer Haleby, Reĝo Salomono, Stendhal, Maupassant, Dante, Casanova, Goethe, Balzac, Silentiarios, Myrinaios, Verlaine), estas la dua eldono de la 22 famaj sed malmulte konataj (bibliofila raraĵo!) sonetoj, plilarĝigita per trideko da novaj, kun „Komplezaj klarigoj“, versforma erotika vortaro, kiun devus trastudi ĉiu amanto de la poezio kaj de la lingvo.

Ĉar Peter Peneter por ĉiam malaperis en la ombrojn de la mondmito, lia filo, Georgo Peterido Peneter „ne povis rifuzi la devon relevi la falintan torĉon kaj plui la vojon tratatitan de la senmorta poeto de la **Sekretaj Sonetoj**“. La rezulto — kelkaj travestioj de la tradukoj de Kalocsay kaj Waringhien + kelkaj memstaraj verkoj de G.P.P.

El pli ol 250 paĝoj de la libro, mi citos nur la 34-an el la „Sekretaj Sonetoj“, siaspecan kredon de la poeto:

Petranca kun sopiro senkonsola,
Dante admire kaj **Camões** kun ĝem'.
Spenser fesonge, **Ronsard** kun **logem'**
sonoris per soneto dolĉparola.

Kaj multaj, multaj kun flutsono mola
kunplektis dekkvar versojn je poem',
sed — nur flankumis ĉirkaŭ l' vera tem',
kiel la kato ĉirkaŭ l' kaĉo bola.

La versoj kantis pri la am' spirita.
Sed se l' virinanim' per rava ŝel'
de varma korp' ne estus envolvita,

se ĉe la zon' finiĝus la anĝel',
ĉu kantoj sonus?

La plimulto de la pecoj de tiu ĉi „Libro de Amo“ estas majstroverkoj de la Esperanta poezio, el kiuj sentiĝas la ĉesto de genia(j) poeto(j), per kiu la erotika temo povis rafiniĝi kaj kristaliĝi al sublĭma arto.

Fine, mi povas preterpasi ankaŭ la malpli multajn falojn, eĉ fiaskojn, tie kie la sublimigita erotiko cedas lokon al banaleco, trivialeco. Interŝanĝe por la citaĵoj el la „Eseoj“ de Montaigne en la „Antaŭparolo“, permesu al mi citi lian grandan disĉiplon Andréon Gide kaj pardonu al mi pro tiu traduko el lingvo kiu al mi ne estas gepatra:

„Mi vivis en la konstanta, delica atendo de ia ajn estonto. Mi al kutimiĝis, kiel demandoj antaŭ la atendantaj respondoj, al tio ke la soifo ĝin ĝui, naskiĝinta antaŭ ĉiu volupto, senpere antaŭas ĝian ĝuadon. Mia feliĉo devenadis de tio, ke ĉiu fonto riveladis al mi soifon, ke en la senakva dezerto, kie la soifo estas nekvietigebla, mi ankoraŭ preferis al ĝi la fervoron de mia febro sub la ekzaltiĝo de la suno. Vespere estis mirindaj oazoj, ankoraŭ pli freŝaj estinte dezirataj la tutan tagon“. (La teraj nutraĵoj, La rakonto de Ménalque).

Do Gide instruis atendi la ĝuadon, ĝin soifi, pli ol sin doni al ĝi senhezite.

„Natanaël, mi parolos al vi pri la atendoj. Mi vidis la ebenaĵon, somere, atendantan; atendantan iom da pluvo. La polvo sur la vojoj fariĝis tro malpeza kaj ĉiu vento ĝin levadis. Tio eĉ ne plu estis deziro; tio estis antaŭtimo. La tero fendetiĝadis de sekeco kvazaŭ por akcepti pli da akvo“. (La citita verko kaj loko).

Se la poeto(j) estus aŭskultinta(j), krom la leciono de Montaigne, ankaŭ tiun de Gide, pri la duobligado de la kontenteco per ĝia prokrastado, (i)li estus evitinta(j) tiun kelklokan flaskon, kaj la verko gajnus en sia poezia forto kaj potenco.

La libro enhavas ĉe la fino komplementajn klarigojn kaj glosojn de, plejparte, poeziaj vortoj.

P. S.

TRI SOVETAJ BROŝUROJ

KANTOJ DE SOVETAJ KOMPONISTOJ. Eldonisto: Komisiono pri Internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo 1965. Formato 20 x 13 cm, paĝoj 35, hektografita.

JANIS BAINIS, latva popola poeto. Poezio kaj prozo. Moskvo 1965. Formato 20 x 13 cm, paĝoj 30, hektografita.

Miĥa'il Ĉeloĥov LA SORTO DE HOMO. Tradukita novelo. Eldonisto: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo 1965. Formato 20 x 13 cm, paĝoj 40. Hektografita.

KANTOJ de sovetaj komponistoj sur sia blanka kovrilpaĝo montras ĝuste tiun titolon verŝajne por ke ĝi ne estu tro longa, sed ankaŭ ĉiuj tekstoj estas de sovetaj poetoj, kiujn kantigis sovetaj komponistoj. La tuta kantlibro estas bone redaktita. Inter la notlinioj ĉiam troviĝas la unuaj versoj, kaj post la notaro presita estas la tuta poemoteksto. Preskaŭ ĉiujn tradukis Gusev. Inter la verkintoj de la teksto troviĝas ankaŭ la nomo Evtuŝenko. Tiun kantlibron eniris lia konata poemo „Ĉu celas rusoj al milit“, kiun muzikigis Kolmanovskij. 17 kantoj troviĝas sur 36 paĝoj. La temoj estas plej diversaj. Apud la „Himno de la demokrata junularo“ kaj „Buhenvalda sonoro“ troviĝas la konata, ĉarma amkanto „Apudmoskvaj vesperoj“. Ia ajn biografio noto pri la aŭtoroj kaj komponistoj mankas, verŝajne pro malabundo de la paĝoj en tiu publikaĵo, kiu forigas la trezoron de la esperantaj kantlibroj, la libromaterialo pli bezonata ol trovebla.

Sur la blanka kovrilo de la broŝuro elstarigas malhele blua titolo: Janis Rainis, latva popola poeto. Ĉi tiu publikaĵo celebras la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de la poeto kaj konigas parton de la verklaboro de tiu poeto, apartenanta al la malgranda latva popolo, al la vasta internacia publiko. La enhavo komenciĝas per prezento de la vivo kaj vivoverko de Rainis el plumo de Burgmeister. Tiu prezentisto detale, sed ne en la eseista stilo, rakontas pri la latva poeto. Rilate ion li malpravas. La verkoj de Rainis ne estas vaste konataj ekster la limo de Latvio. Eble en la tuta Sovetunio jes, sed ne ekster ĝi. Ni malgrandaj popoloj ne trompu nin. Nia kultura trezoro estas tre malmulte konata ekster nia domo. Ĝi estas enmurita inter la limoj de niaj monde nekonataj lingvoj. Ĝuste pro tio ĉiu esperantigo el la lingvo de malgranda popolo, signifas tre multe. Ankaŭ Janis Rainis estas internacie nekonata, kvankam certe lia talento meritis pli grandan famecon. La sovetaj publikaĵoj konigas 13 poe-

mojn, fragmenton el unu poem-dramo kaj aforismojn de Janis Rainis. Kelkajn poemojn tradukis Kurzens, aliajn Lippe, Gusev kaj Jakubcova. Rainis estis la fondinto de la nuntempa latva poezia esprimo. Liaj poemoj estas stile maturaj, verkitaĵoj en la tekniko de senteblo ritmo kaj regula rimo. Liaj temoj estas variaj: amo al la patrolando, revolucia ribelo kontraŭ tiam reginta carismo, pri-kanto de malnovaj legendoj kaj fabeloj. El ĉiu linio radias lia optimisma kredo al la pli bona estonto. La suno estis lia poezia idealo kaj simbolo. La vizion pri ĝi li enteksis en multajn siajn poemojn:

Sunotuko hela
volvos varme ĉiun vivoorfon.

Aŭ

Antaŭen! Nin atendas suna for'.

La poemoj de Rainis karesas la estetikan senton, sed liaj aforismoj ĝuste konsternas la leganton per sia aktualeco. Jen:

— Facile devojn surprenas nur tiuj homoj, kiuj ilin ne plenumas.

— Estas homoj, kiuj havas nenion propran, eĉ propran kulpon ne, ĉiam aliaj estas kulpaj.

Vere esperantistoj, se pro nenio alia, pro tiuj aforismoj devus legi la poemlibron de Rainis.

Miĥail SOLOĤOV estas la pasintjara laŭreato kronita per la plej alta internacia literatura agnosko: la Nobel-premio. Tiu fakto ankoraŭ pli gravigas la malgrandan libreton, kiu entenas tradukon de lia novelo „La sorto de homo“. Miĥail Ŝoloĥov estas mondkonata verkisto. Nobel-premio nur solene agnoskis ion, kion la monda literatura publiko donis al Ŝoloĥov antaŭ multaj jaroj: la mondfamon. Ĉiuj plej bonaj elementoj de lia stilo nestas ankaŭ en la 40-paĝa novelo „La sorto de homo“. Verkita en la realisma stilo, ĝi esprimas per simplaj vortoj la tutan riĉan gamon da suferoj kaj doloroj, kiujn ĝisvivis unu rusa laboristo en la pasinta mondmilito kaj post ĝia fino. Militeruraĵoj estas la fono de la subjekto, la ĉefaĵo estas la reflektiĝo de tiuj teruraĵoj en la koro kaj animo de la ŝoforo Sokolov. Simpla kaj granda temo de la komenco ĝis la fino. Profunde soveta kaj profunde homa de la komenco ĝis la fino. Rainis diris en unu sia aforismo:

— Ĉion, kion diras la menso, oni povas traduki en ĉiujn lingvojn, sed kion diras sentoj — en neniun.

Tamen la tradukintoj Agosti kaj Danovskij sukcesis traduki la etoson de tiu verko, ili sukcesis kortuŝi la leganton. Tio plej gravas. Kelkaj gramatikaj diskutindaĵoj kaj kelkaj preseraroj ne gravas. Tio ne ŝtenas la leganton senti en la Esperanta vesto la senperecon kaj homvarmecon de la ruso Ŝoloĥov.

Emilija Lapenna

Givoje Marinko

**KONCIZAJ BIOGRAFIOJ
DE JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ**

Morĝin Ivan „Crni“ nask. 14. I. 1910 en Smokovljani (Peljeŝac) Suisto, laboristo, membro de KPJ ek de 1934, aliĝis al la naciliberiga batalo en 1941, pereis en 1944. Unu el la plej kuraĝaj antaŭbatalantoj kaj aktivaj organizantoj de naciliberiga batalo en Suda Dalmatio. Proklamita Nacia Heroo. Esperantistiĝis en 1923 en Janjina.

Muhar Karlo nask. 13. XII. 1923 en Batina (Moslavina). Profesero en okklasa lernejo por nevidantoj en Zagreb. Esperantistiĝis en 1935, gvidis multajn kursojn (de 1950 regule instruas Esp-on en ĉiuj superaj klasoj de 8-klasa lernejo por nevidantoj). Kiam en 1953 en Zagreb okazis la 23-a Internacia kongreso de blindaj esp-istoj li, kiel membro de la prepara komitato, redaktis la kogresan libron kaj gvidis ĉefe la laborojn. Kunlaboris en LSS. Nia Vivo, Socijalna misao kaj Specijalna ŝkola.

Adreso: Zagreb, Višegradska 11

Musi (Mussi) Anton nask. en Vransko (Slovenio). Eksperto en lignofako. Aktivis kiel esperantisto unue en Celje poste en Zagreb ĉe LES kaj AEK, kie li gvidis superajn kursojn. Estis II. sekr. de JEL (1937), kunlaboris en LSS kaj Antaŭen. Pereis komence de 1945.

Negovetiĉ Ljudevit nask. 1909. Unu el la plej aktivaj esperantistoj en Sarajevo. Komitatano, sekretario, kaj fine prezidanto de Esperanto-Ligo por Bosnio kaj Hercegovino.

Adreso: Mehmed Paŝe Sokolovića 12a/I

Neŝiĉ Marko, proleta poeto kaj komponisto, unu el la ĉefaj pioniroj de Esperanto en Novi Sad kaj Vojvodio kaj la unua prezidanto de Esperantista Laborista Rondo de ĝia fondiĝo 1923 ĝis 1927. Konata sub la nomo „Čika Marko“ (onklo Marko). Mortis 29. IV. 1938 en sia 65-a jaro. Estas konataj liaj apartaj komponaĵoj kun liaj propraj poemvortoj en Esperanto kaj muziko kiel ekz. „Salut’ al vi“ kaj „Esperanto kurso“ Krom partoprenanto en muzikpunktoj dum publikaj E-aranĝoj, li estis ankaŭ propagandisto kaj instruanto en E-kursoj. Kiel kunfondinto de LES Novi Sad proklamita honora prezidanto de tiu societo. La E-societo en Novi Sad kaj unu strato portas lian nomon.

Lit: LSS 4/1932 p. 47; 6/1938 p. 44 kaj 46.

Nikĉević Radislav nask. 23. I. 1917 en Stubica (Crna Gora). Juristo, membro de KPJ de 1935. Aliĝis al la naciliberiga batalo en 1941. Pafmortigita 1941 en Miloŝevo. Proklamita Nacia Heroo. Esperantistiĝis en 1933 en Kragujevac, gvidis E-kursojn.

Nikoliĉ Danĉika nask. 14. XI. 1912 en Kula. Eksdirektoro de Statistika oficejo por Vojvodio en Novi Sad (1946—1950). Specialiĝis en matematika statistiko kaj ekonometrio en Svislando (1948—9) kaj Usono (1952—53). Nun faka kunlaboranto en de Federacia instituto por planekonomio.

Esperantistiĝis en 1931 kiel gimnaziano en Novi Sad. En Kula gvidis E-kurson, iniciatis fondiĝon de Amika Rondo Esperantista kaj kune kun Jozef Santa redaktis aŭtogr. internan organon „La lernanto“ (1932—33). En la kadro de Beograda Esperanto-societo iniciatis fondiĝon de Studenta E-sekcio (1935) kaj Studenta E-klubo (li estis ĝia unua prezidanto kaj poste honorprezidanto 1935—1940). Gvidis plurajn kursojn. Post la dua mondmilito reaktiviĝis en BES, kunlaboris en „La Progreso“ (1954—5), estis vicprezidanto de Serbia Esperanto-Ligo (1954—5), unua prezidanto de Beograda Esperanto-Komitato (1957—8), ek de 1961 komitatano de AK de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

Adreso: Beograd, Lomina 47.

Novakoviĉ Boja nask. en Zadar 1841, mortis en Cetinje 4. VIII. 1903. Instruisto, poste finis Juran fakultaton kaj revenis al Cetinje kie li fariĝis profesoro de Teologia kaj Porinstruista lernejo kaj gimnazio 1887—1890 direktoro de gimnazio, ankaŭ prezidanto de la komunumo Cetinje kaj redaktoro de kelkaj montenegraj kaj serbaj gazetoj. Li estas unu el la unuaj esperantistoj en Montenegro, kiu bone konis kaj instruis Esperanton.

Noveljiĉ Bogiĉ nask. 1908 en Stijena Piperska. Instruisto, post la Dua mondmilito inspektoro de Kontrola Komisiono por Montenegro ĝis 1950 kiam li fariĝis direktoro de okklasa lernejo en Titograd.

Esperantistiĝis en 1932, abonis kaj kunlaboris en kelkaj E-gazetoj, gvidis E-kursojn, kunlaboris en kolektado de biografioj de montenegraj esperantistoj k.s. Fondinto de la societo en Titograd. Organizanto de la Ĉefkomitato de JEL por Montenegro.

Adreso: Titograd, stari aerodrom 2-a.

Novljan Franc, emerita direktoro de gimnazio, popolklerigisto kaj esperantista propagandisto, nask. 7. VIII. 1879 en Boljun (Istrio). Gimnazion vizitis en Rijeka (1891—9), Filozofian fakultaton (matematiko kaj fiziko) en Vieno 1899—1905. Instruis en la gimnazio en Pazin (1905—1914), translokiĝis 1918 al Zagreb, kie li aktivis sur diplomacia kampo 1918—9 (por liberigo de Istrio); profesoro de Porinstruista lernejo kaj gimnazio en Zagreb (1920—29), Bjelovar (1929—33), Nova Gradiška (1933—9) kaj direktoro de la II. gimnazio en Zagreb 1939—1941, kiam li emeritiĝis. Vivis en Praha 1942—7, revenis Zagreb 1947, kie li vivas ankaŭ nun.

Kiel popolkleriganto li iniciatis fondon de Istria klubo en Vieno kaj estis ĝia prezidanto 1900—1904, Popola universitato en Pazin kaj estis ĝia prezidanto 1906—14 kaj Kleriga ligo en Zagreb (sekretario 1920—29).

Agado por Esperanto: Esperantistiĝis 1920, gvidis multnombrajn E-kursojn, skribis infomajn en gazetoj, faris plurajn publikajn paroladojn pri Esp-o; en 1922 enkondukis Esp-on kiel regula objekto en la vespera lernejo de „Prosvjetni savez“ (Kleriga ligo); aparte okupiĝis pri verkado de lernolibroj; en 1952 iniciatis kampanjon por enkonduko de Esp-o en la lernejojn kiel deviga studobjekto; en „Školske novine“ Zagreb aperis lia kurso en daŭrigoj. Li estis komitatano de diversaj E-organizoj (en Kroacia E-Instituto prezidanto de la ekzamena komisiono).

Verkoj: *Ĝto smo, ĝto imamo?* (Pazin, 1910); *Radno slobodno učilište. Korresponda Esperanto lernejo en 30 lecionoj* (Zagreb, 1929); *Internacia lingvo esperanto. Lerno- kaj legolibro kun vortklarigoj* (Slavonski Brod, 1932); *Esperanto en tridek lecionoj. Facila lernolibro por lernejoj, kursoj kaj memlernantoj. Represita el „Školske novine“* (Zagreb, 1953). Artikoloj en nacia (Dom, Nezavisnost, Narodna Prosvjeta k.a.) kaj Esperanto gazetaro (ISS).

Lit: *Znameniti i zaslužni Hrvati 1925—1925; Đački list*, Zagreb, 1927; *Obzor*, Zagreb 1929 n-ro 211; LSS 6/1945.

Adreso: Zagreb, Badalićeva 9a

Grajem Anton, tajloro, kunfondinto de E-societo Celje, mortis 2. III. 1962 en 78-a jaraĝo. Estis la plej aĝa kantisto en la urbo, honora membro de tiea kantista societo fervojista kaj de E-societo en Celje. Esperantistiĝis post la Unua mondmilito, estis plurajn jarojn prezidanto de E-societo. Nekrologo aperis en „Celjski tednik“ de 9. II. 1962.

Osibov Ivo, nask. 10. II 1937 en Kaštel Štafiljiĉ apud Split. Juran fakultaton finis en Zagreb (diplomiĝis 1960). Postenis ĉe Komunuma Juĝejo en Split, nun ĉefo de jura sekcio de entrepreno „Jugoplastika“.

Dum la studado en Zagreb tre aktiva: komitatano de SEK, sekretario de la I Esperantista Junulara Laborbrigado, kelktempe sekretario de KEL, ko-

mitatano de JEJA kaj prezidanto de TEJO, kelktempe redaktoro de Junulara rubriko en revuo „Esperanto“, komitatano de E-societo Split kaj de JEL.

Adreso: Split, Splitskog odreda 15

Pancer Oton, prof. D-ro inĝ., nask. 4. III. 1907 en Bugojno. Gimnazion vizitis en Banja Luka kaj Zagreb, agronomion studis en Zagreb 1925—9. Instruis en agrikultura mezlernejo en Krijevci 1934—1941, kiam malliberigita. Partoprenis la naciliberigan batalon. 1945—48 ĉefo de Instituto por ekonomio de agrikulturo, de 1948 ĝis nun docento kaj profesoro de Agronomia fakultato (unue en Sarajevo, nun en Zagreb).

Esperantist ĝis en 1935, gvidis kursojn, en 1949 helpis en organizo de Esperanto-Ligo BkH en Sarajevo kaj estis ĝia prezidanto de 1950 ĝis 1960, samtempe unu el la vicprezidantoj de JEL. En la kadro de Someraj Universitatoj prelegis pri ekonomio de agrikulturo k.s. Nun prezidanto de la Kroatia Esperanto-Ligo.

Verkoj: Nizozemska — Život-Rad-Ljudi (Seljačka Sloga, Zagreb, 1956); Prilog proučavanju radnog procesa u govedarstvu na planinskom gospodarstvu »Gvozno« (Radovi Poljoprivredno-šumarskog fakulteta Sarajevskog univerziteta br. 4—5, Sarajevo, 1954) kun resumo en Esperanto; »Parto de esplorado pri ekonomio de bovbredado sur »Gvozno«; tradukoj, »Život biljaka« (»La vivo de la plantoj« de D-ro P. Neergaard) el Esperanto al serbkroata lingvo (Sarajevo, 1959) kaj aliaj sciencaj kaj fakaj artikoloj.

Lit.: Ko je ko u Jugoslaviji (Beograd, 1958), Oslobođenje, Sarajevo, 19. II 1959.

Adreso: Zagreb, Voćarsko naselje 12.

Pavlović M. Milivoje nask. 27. V 1907. en Leskovac, kie li vivis ĝis 1923 kiam li eniris ortodoksan teologian lernejon en Bitolj. Fininte la studojn ricevis pŝenon en la Ortodoksa konsistorio samloke. Estis paroĥestro en vilaĝo Ĝavato kaj en Svetozarevo. Post diplomiĝo en la filologia fakultato en Beograd, profesoro de franca lingvo en Prekalje apud Drvar.

Esperantistiĝis en 1930, gvidis kursojn, fondis grupon: post la Dua mondmilito gvidis E-kurson en Svetozarevo en 1951 kaj estis kunfondinto de lia E-societo. Tradukis kaj verkis poeziaĵojn. Okaze de la Belarta konkurso, dum la 16-a Kongreso de jugoslavijaj esp-istoj en Sarajevo, ricevis la 1-an premion por traduka poezio (En la tiliaro de Ĝ. Jakšić). Liaj poemoj presitaj en la poemaro »Reeĥoj« (STAFETO).

Adreso: selo Prekalje kod Drvara (Bosna)

Pečar Stanko, advokato, revoluciulo kaj kultura aktivulo, nask. 8. XI. 1898 en Sv. Lovrenc apud Slov. Gorice. Finis Juran fakultaton en Ljubljana 1922, postenis en Celje, Novo mesto, Kočevje ĝis 1933 kiam li malfermis advokatejon en Novo mesto. En 1941 li aliĝis al la naciliberiga batalo, en 1942 arestita, mortigita en 1943 en koncentrejo Osvjencim.

Esperantistiĝis en 1937, tradukis poemojn kaj kantojn (kelkaj aperis en LSS 1938) kaj postlasis aperis E-gramatiko »Miaj poeziaĵoj«, kiu estas konservita en Studijska knjižnica, Novo mesto, kune kun lia biblioteko kaj korespondado.

Perko Lojze, akademia pentristo, nask. 21. IV. 1909 en Stari trg pri Ložu. Studis pentroarton en Ljubljana kaj Sofio. Ekspoziciis en Maribor, Beograd, Ljubljana kaj ĉe la I. ekspozicio de artistoj-esperantistoj en Novi Sad 1938. Esperantistiĝis en Ljubljana.

Adreso: Notranjsko ob Cerknjškem jezeru.

Pesić Petar, unu el la plej elstraj E-aktivuloj ĉe nevidantoj en Jugoslavio, nask. 1904. Redaktoro de brajle presita revuo en Esp-o »Nia Vivo« (Zemun 1950—53). Tradukis literaturaĵojn tie presitajn (fragmentoj de Andrić, Ĉankar, Ĉosić, Desnica, Nikolić k.a.). En monata nacilingva brajla revuo »Kulturni glasnik« ekde 1954 aperis E-gramatiko en 20 daŭrigoj de li kompilita.

Tradukoj: Niko Bartulović: T. G. Masaryk (Zemun, 1937); Blindulinstituto en Moskvo; Letero de d-rino Helen Keller (Zemun, 1938), Tra la Blindul-

instituto en Zemun (1937); N. Bartulović: Karel Čapek (Zemun, 1939). Verkis: Ekskurso de jugoslaviaj nevidantoj instruistoj al Ĉeĥoslovakio (Zemun, 1936), Nevidantaj terkulturistoj en Jugoslavio (1937).

Adreso: Zemun, Cara Dušana 143.

Petkoviĉ Rade nask. 5. V. 1915 en Ŝibenik. Ŝuisto, komercisto. Esperantistiĝis en 1935, gvidis kursojn, estis kunfodinto de E-sekcio ĉe Laborista sporta klubo kaj post la dua mondmilito de E-societo »Stipe Niniĉ« en Ŝibenik.

Adreso: Prodavaona »Peko«, Ŝibenik.

Petriĉ Marija nask. 9. I. 1903 en Stična. Postenis en asekuroficejo »Dunav«, poste DOZ, emerita 1953.

Esperantistiĝis en 1921, gvidis E-kursojn en Ljubljana. En 1954 komencis verki vortaron, kiun eldonis ŝtata eldonejo Mladinska knjiga: Slovensko esperantski slovar (Ljubljana, 1964).

Adreso: Ljubljana, Miklošičeva 17/III

Petriĉeviĉ Franjo nask. 25. IV. 1907 en Koprivnički Bregi, emerita direktoro de Soci-asekura oficejo en Koprivnica. Esperantistiĝis en 1924, estis unu el la organizantoj de la landa kongreso en Koprivnica, gvidis E-kursojn en Bregi kaj Koprivnica.

Adreso: Koprivnica, Basaričekova 14.

Petrov Srĝan nask. 21 XII. 1906 en Uljma. Fervoja laboristo, revoluciuo, paimortigita en 1941. Kiel bona kaj fervora esperantisto li propagandis la E-ideon en laboristaj rondoj. La fervojista kultur-arta societo en Osijek portas lian nomon.

Petroviĉ Momir, esperantista propagandisto kaj aktivulo en Sarajevo. Prezidanto de Pedagogia Societo por Bosnio kaj Hercegovino, Komitatano de JEL kaj ĝia Ĉefkomitato por BkH.

Adreso: Sarajevo, Krajiška 7/II.

Petroviĉ S. Svetislav nask. 1899 en Pirot, mortis 24. XI. 1960 en Beograd, kie enterigita. Instruisto, E-poeto, vivis kiel emerita profesoro en Pirot. Postenis unue kiel instruisto en Ohrid (1921—24) kaj Prilep (1924—5), estinte tie delegito de UEA. Konis kelkajn lingvojn.

Esperantistiĝis en 1916. Aperigis artikolojn pri Esp-o en „Južna Zvezda“ (Bitolj), »Zorica« kaj »Zranci« (Beograd) kaj »Zavičaj« (Skopje). Kiam li estis en la Supera Pedagogia Lernejo li verkis lernolibron: Meĉunarodni pomoĉni jezik esperanto (Beograd, 1926). Li estis ankaŭ la jugoslava reprezentanto de la Internacia Pedagogia Revuo ĝis la j. 1931, kiam tiun funkcion transprenis Stanko Petroviĉ, Beograd.

Tradukis el Esp-o en la serban lingvon: Dr Hugo Erichsen, Spaljivanje protiv sahranjivanja (Beograd, 1926); Psihoanaliza i odgoj de P. Bovet (1927); Montara florkrono (Gorski vijenac) de Njegoš (manuskripto). Verkis: Sonetkrono por la Esperantistaro (Beograd, 1959). Pluraj laboraĵoj en lingvoj serba, esperanta kaj franca.

Li estis unu el la fondintoj de E-societo »Tapiŝurbo« en Pirot, kaj ĝia prezidanto, Komitatano de SEL kaj membro de Beograda E-Instituto.

Petruŝevski Apostola Boro-Papuĉar nask. 1920 en Kumanovo. Membro de PKJ de 1939, aliĝis al la naciliberiga batalo 1941, pereis 1934. Proklamita Nacia heroo. Li apartenis al la unua grupo de esperantistoj en Kumanovo kreita en 1937 de Boro Menkov.

Pipiniĉ Josip, tipografo, nask 1893, esperantistiĝis 1912. Gvidis multajn kursojn, aperigis multajn artikol(et)ojn en diversaj grafikaj gazetoj kaj-

revuoj (Grafički radnik, Grafička Revija, Mladi Grafičar, Grafički rad) kaj aliloke. Li estis aranĝinto de impona Internacia Grafika Ekspozicio kiu migris al pluraj jugosl. urboj (1927) — la unika tiaspeca aranĝo ĝistiam.

Adreso: Zagreb, Prešernova 3/III

Poljšek Vilim, komerca oficisto, nask. 7. VIII. 1910 en Selnice apud Zagreb. Esperantistiĝis en 1922, en 1932 aliĝis al E-klubo Bjelovar kie li aktivis ankaŭ nun (sekretario ek de la jaro 1950). Multnombraj kursoj en la societo kaj lernejoj.

Adreso: Bjelovar, Vinkovićevo 2.

Popović Bojidar, d-ro, nask. Klanovac (Vranje, Serbio) 26. X. 1912. Profesoro, matematikisto-astronomo.

Kariero: Elementan lernejon vizitis en Klinovac, gimnazion 1923—31 en Vranje kaj Skopje, Filozofian fakultaton (grupo por Teoria matematiko) en Beograd 1931—1935, profesora ŝtat-ekzameno 1938 en Beograd, doktoriĝis pri matematikaj sciencoj en Zagreb 1957. De 1936 ĝis 1945 li estas gimnazia profesoro en Beograd kaj Kragujevac (1938/9), kiam li eniras Jug. Popolarmeon, kie li restas ĝis febr. 1948, post kio li laboras en Astronomia Observejo Beograd kiel asistanto kaj poste scienca kunlaboranto, de 1949 ĝis 1952 li estris la Observejon, unue kiel sekretario, poste kiel anstataŭanto de la direktoro. De 1954 ĝis 1966 profesoro pri matematiko en la Arbarista fakultato en Sarajevo, post tio en teknika fakultato en Niš.

Agado por Esperanto: Esperantistiĝis en 1932 en Beograd, kie li estis kunfondinto de Studenta E-klubo; post la milito li aktivis en E-societo Beograd kaj en Serbia E-Ligo, fondinto de Eldona Kooperativo; poste en Sarajevo kaj en E-Ligo por BH. Krom la organizaj taskoj, interalie preparoj por la 16-a landa kongreso, gvidis kelkajn kusojn kaj faris prelegojn, verkis lernolibron de Esperanto. En 1958 fariĝis la unua direktoro de E-instituto en Sarajevo. De 1952 ege aktiva en ISAE kie li en 1954 fariĝis la ĝenerala sekretario; diversaj aktivecoj en ISAE, inter ili aperigo de »Sciencaj Studoj«, plifortigo de organizo, eldonado de »Scienca Revuo« kaj Bultenoj de ISAE. Komitatano de UEA de 1953, 1962—65 Direktoro de Jugoslavia Esperanto-Instituto.

Verkoj: Esperanto u 10 lekcija (lernolibro, Beograd 1954), Esperanto u 12 lekcija (plibonigita eldono, Beograd 1954, 3—a eld. 1955, 4—a eld. 1956, Naučna knjiga); Problem međunarodnog jezika nekad i sad (Sarajevo 1955). Multaj sciencaj artikoloj el matematiko kaj astronomio en fakaj periodaĵoj (specialan atenton li dediĉis al praktika uzo de vektoraj elementoj de plandetorbitoj), deko kun E-resumoj: (aperintaj en Bulletin de l'Observatoire astronomique de Beograd, Radovi Poljoprivredno-šumarskog fakulteta Sarajevo, Bulletin de la Société des mathématiciens et physiciens de la P.P. de Serbie k.a.). Aliaj verkoj: Primena računa verovatnoće u šumarstvu (Studentska tehnika, Sarajevo, 1954) Viša matematska za studente šumarstva; Kako su ljudi u toku vekova zamišljali svet (Beograd, 1953).

Popović estas aktivulo ankaŭ en la kontraŭalkohola batalo ekde 1928, prelegantno de la ISU dum la universalaj E-kongresoj, membro de Internacia Astronomia Unio.

Adreso: Niš, tehnički fakultet.

Popović — Ćupić M. Risto, nask. en Zagarč (Montenegro) 11. IV. 1870 mortis 29. VI. 1922 en Zagarč. Elementan lernejon finis en Zagarč, gimnazion, Teologian kaj porinstruistan lernejon en Cetinje. Longe li estis instruisto, en 1893 fariĝis pastro. Ekde la jaro 1893 li okupiĝis pri literaturo, kunlaboris en la revuoj „Bosanska vila“, „Luča“, „Neven“, „Golub“ k.a. Li verkis poemojn, rakontojn kaj preĝejaĵajn solenajn paroladojn. Ankaŭ okupiĝis pri tradukado, precipe el Esperanto. Ĉiuj liaj rakontoj enhavas motivojn ĉefe el Montenegra kaj apudmara vivo.

Li esperantistiĝis en 1908, kunlaboris en „Kroata Esperantisto“ iniciatis E-rubrikojn en montenegraj gazetoj.

Lit.: Antologija Crnogorskih pjesnika i pripovjedača prof Pera Božovića, 1927.

Prebil Ludovik, nask. en Brezovica (Ljubljana) 9. VIII. 1900, fervojoficisto, faka instruisto. Finis klasikan gimnazion en Ljubljana kaj 5 semestrojn de jura fakultato (1921—4). Fervojoficisto en Maribor 1941—45 kaj post 1945 fakinstruisto en Fervoja industria lernejo Maribor.

Esperantistiĝis 1926, kursgvidanto kaj prezidanto de E-societo Maribor 1928—9. Tiutempe la sidejo de JEL estis en Maribor, li estis II sekretario kaj resp. redaktoro de „Konkordo”, kunfondinto de E-societo en Beograd kaj dum 6 jaroj ĝia kasisto. Poste de 1938 ĝis 1941 prezidanto de E-societo Maribor kaj post la liberigo denove ĝis la jaro 1956. Ĉiujare li gvidis E-kursojn, precipe por fervojistoj. Kunfondinto de Fervojista E-societo Maribor (1958). De 1958 prezidanto de Distrikta komitato de SIEL en Maribor.

Adreso: Maribor, Tomanova 19.

Preksavec Josip, librobindisto, nask. 1909, esperantistiĝis 1927 kaj aktivis en grafikista E-rondo, peranto de IGPBL por Jugoslavio. Tradukis ampleksan resumon en Esp-o en la verko de Vinko Cević „Historija organizacije i političkih borba grafičkih radnika Hrvatske 1870—1955 (Zagreb, 1955).

Adreso: Zagreb, Dolanečka 7/III.

Premuj Vjekoslav, meblisto, nask. 19. VI. 1892 en Varaĵdin, mortis en aŭgusto 1961 en Osijek. Elementan lernejon kaj metilernejon vizitis en Varaĵdin, de 1925 ĝis 1929 vivis en Sombor, post tio en Osijek.

Li estis unu el ĉefaj E-aktivuloj en Slavonio. Unuan E-kurson li organizis en Sombor kaj estis konfondinto de tiea Laborista E-Klubo en kadro de la sindikatoj. En 1933 li organizis elementan kurson en Osijek kaj fondon de Laborista Esperanto-Klubo. Sekvis kurso en Sušine-Gurĝenovac kie fondiĝis en 1934 filio de LES.

En 1935 li entreprenis kaj redaktis propagandan revuon NAPRED — ANTAUEN kiu fariĝis organo de laboristoj esperantistoj el Osijek kaj ĉirkaŭaĵo kaj aperis en Osijek kun interrompoj ĝis la j. 1947, kiam komencis kaj samjare ĉesis aperi Jugoslavia Esperanto Gazeto, de kiu li estis ĉefa kaj resp. redaktoro. En 1947 li eldonis unu numeron de ESPERANTO. Ilustrovani list za samouke kun la teksto en kroata, hungara kaj Esperanto. Pro sia progresema sinteno dum malnova Jugoslavio multe persekutata de la polico. En 1948 li refondis la societeton sub la nomo de „Liberiga Stelo“, en 1953 refondis filion de LES.

Puhalo Dušan, aktivis kiel studento en AEK Zagreb, kunlaboris en LSS antaŭ la II mondmilito (poemtradukoj, artikoloj pri kroata arto).

Puhalo P. Ilija, fervojoficisto, nask. en Bregi 1899, mortis 21. VI. 1937 en Koprivnica (enterigita en Bregi). Esperantistiĝis en 1922 kaj fariĝis fervora propagandisto, kunfondinto de IAEF, teritoria sekretario de UEA por Jugoslavio 1924—1928, redaktoro de la postmilita organo »La Fervojisto« (Zagreb 1924—1930). Redaktis Kongresan libreton de la VII. Jugoslava Esperanto-Kongreso Koprivnica 1934. Verkis plurajn artikolojn, plejparte en »Podravske novine«, en 1934 unu el la aranĝintoj de la VII. landa E-kongreso en Koprivnica.

Lit.: LSS 5/1937 p.35

Racin Kočo (vera nomo Kosta Apostolov Lolev), verkisto, konata makedona poeto, nask. 1908 en Veles, pereis en Naçiliberiga batalo 13. VI. 1943. Konstrulaboristo, korektisto. Persekutata pro revolucia agado. Kunlaboris en progresemaj revuoj Umetnost i kritika, Literatura, Naša stvarnost. En Zagreb aperis 1939 lia poemaro Beli mugri. Li verkis rakontojn, studojn k.a. Li esperantistiĝis en Titov Veles en 1932 en la kurso kiun gvidis Vasil Gorgov (nun parlamentano).

Lit.: Jugoslavia Enciklopedio, Zagreb 1926 vol. 6

Radakoviĉ M. Branko, nask. 13. III. 1923 en Titel. Oficis en Instituto kontraŭ tuberkulozo, poste redaktoro de Moto-Revija. Esperantistiĝis en 1954. Estis sekretario de Studenta E-klubo »Bajo Sekuliĉ«, de Belgrada E-societo „Radomir Klajiĉ“, kaj de SEL, membro de redakta komitato de „La Progreso“ kie li aktive kunlaboris. Serbia E-Ligo presigis lian verketon »Du noveloj« (Beograd 1955). Aliaj funkcioj kiujn li okupis: prez. de E-societo, sekretario de JEĴA, membro de Esperanto-Instituto en Beograd, fakdelegito de UEA. Inter 1954—6 verkis plurajn artikolojn, tradukojn kaj kelkajn recenzojn.

Adreso: Beograd, Knez Mihajlova 42.

Radiĉ Stjepan, politikisto kaj verkisto, nask. en Trebarjevo 11. VII. 1871, mortis en Zagreb 8. VIII. 1928. Li estis bona esperantisto kaj kiel ministro havis en plano enkondukon de Internacia Lingvo en la lernejoj, sed tion malebligis lia morto.

Lit.: Jugoslavia Enciklopedio, Zagreb, 1962. vol. 6

Radosavljeviĉ Dragutin, inĝeniero, nask. 9. XI. 1908 Frankfurt a/M, finis Teknikan fakultaton en Beograd, de 1935 postenas ĉe Fervojdirekcio. Esperantistiĝis 1955, estis (vic)prezidanto de E-societo »R. Klajiĉ« kaj sekretario de JAFE (1962—65).

Adreso: Beograd, Niška 16

Radosavljeviĉ Olga, pentristino, disĉiplo de Jovan Bijeliĉ, nask. 24. V. 1914 en Beograd, esperantistiĝis 1955. Ekspoziciis en Sarajevo 1950, en Beograd en 1955 (kun la disĉiploj de Bijeliĉ), poste en 1961 kaj 1964, en Novi Sad en 1965, kaj kiel esperantistino dum la I. ekspozicio de artistoj-esperantistoj en Novi Sad (portretoj: D-ro L. L. Zamenhof, Tibor Sekelj, E-pioniro Petar Trbojeviĉ el Sombor).

Adreso: Beograd, Niška 16

Radovanoviĉ Bora, grafikisto, nask. en Novi Karlovci 28. III. 1915, organizinto de la unua presejo de Regiona komitato de KPJ por Vojvodino dum la II. mondmilito, elstara politika laborulo, deputito. Esperantistiĝis en 1934, estis kelktempe prezidanto de Vojvodina E-Ligo. Pro siaj meritoj ricevis plurajn ŝtatajn distingilojn.

Lit.: Ko je ko u Jugoslaviji (Beograd).

Adreso: Novi Sad, Slovaĉka 80

Rajšić Branko, fotografisto, nask. 19. VII. 1900 en Zemun. Esperantistiĝis en 1922 kaj de tiam daŭre aktivis en E-movado. Gvidis multajn kursojn, gvidis la societnan vivon en Zemun, longjara sekretario de E-societo Zemun, kelkjare vicprezidanto de JEL, membro de Serbia E-Instituto kaj de Jugoslavia E-Instituto de ĝia fondiĝo. Esperantigis la unuan libron kiu aperis brajle en Esp-o ĉe ni, aranĝita de Veljko Lj. Ramadanoviĉ: Nia koro. Rakontoj por la infanoj (Zemun, 1924), krome por vidantoj la broŝuron de Helen Keller: Ni vojaĝas al Jugoslavio (Zemun, 1932) kaj kanton »Marŝo de paco« de D-ro Petar J. Stankoviĉ (Amsterdam 1953). Kunlaboris en „Konkordo“, LSS kaj Kajeraj. La tuta multinombra familio estas esperantista, same lia ateliero portas E-nomon »Rave«.

Adreso: Zemun, Rajaĉičeva 1.

Rakuŝa Rudolf, Ak., pedagogo, stenografo kaj esperantisto, nask. 22. III. 1893 en Ormož (Slovenio), kie li vizitis elementan lernejon, 1907—12 seminarion en Maribor, 1915 diplomita instruisto, 1921 instrukapableca diplomo por slovena stenografio, 1926 ŝtata ekzameno pri instrukapableco de Esperanto en Vieno. De 1915—1921 instruisto, poste fakinstruisto ĉe la Komerca akademio en Maribor, kie li ricevis la titolon kaj rangon de profesoro, emerito 1951, posedas laborordonon de 3-a grado kaj estas honora membro de Federacia (1955), Kroata (1955) kaj Slovena (1958) unuiĝoj de stenografoj kaj maŝinskribistoj.

Agado por Esperanto: Esperantistiĝis en 1922, skribis regule slovenlingvajn informojn pri Esp. (en *Jutro* 1925—27, en *Večer* sub »Ci tie Esperanto« de 1955), artikolojn, traktaĵojn kaj recenzojn (en *Prosvetni Glasnik*, *Popotnik* k.a.); esperantlingve: en *Konkordo*, *LSS*, *Jugoslavia Esperantisto* k.a.), faris publikajn prelegojn, tradukis el slovena literaturo, verkis E-lernolibrojn. En la j. 1935 elektita kiel ano de *Lingva komitato* (nun ano de la *Akademio de E.*), direktoro de *E-Instituto* en Ljubljana, kiel komitatano de *JEF* komisiita por la *Porlerneja komisiono*.

Verkoj: Esperanto: Lernolibro (Ljubljana, 1937; tralaborita eldono Ljubljana 1951; II eld. en du partoj, Ljubljana, 1956); *Esperanto — važen kulturni faktor* (Ljubljana, 1952); *Instrumento por Esperanto* (Ljubljana, 1957); *Pismo staršem o esperantu*. Zakaĵoj naj se pouĉuje v ŝoli mednarodni jeziki (Ljubljana 1960); *Metodiko de Esperanto-instruado*; *Lernolibroj kiel helpilo* (en »*Esperanto kaj lernejo*«, Ljubljana, 1959); pluraj artikoloj.

Ŝtenografio: *Slovenska ŝtenografija* I (1946, 1950, 1957); II (1948, 1953, 1957); III (1959) k.a.

Maŝinskribado: *Lernolibroj: slovenaj*, 1-a, eld. Maribor 1934; 2-a eld. 1946; kroataj, 1-a kaj 2-a eld. Maribor 1934, 1939, 3-a kaj 4-a Zagreb 1946, 1951; serba-kirila, Maribor 1936.

La reformita slovena ŝtenografio (1946) estas lia ĉefverko. *Rekonataj estas* la meritoj de prof. *Rakuša* por la disvastigo de moderna metodiko de maŝinskribado.

Lit.: *Enciklopedio de Esperanto* (foto); *LSS* 2/1953; *Jugosl. Esperantisto* 3—4/1963; *Slov. poroĉevalec* 26/3 1953.

Adreso: Maribor, Vrbanska 5

Ramljak Ante, d-ro de juro, nask. 1893. Doktorigis en Zagreb, estis sekretario de *Supera tribunalo de Bosnio* en Sarajevo, deputito de la *Jugoslavia konstitucia parlamento*. Antaŭ la II mondmilito li estis komitatano de »*Zadruga hrvatske naklade*« (fondita 1938). Esperantistiĝis en 1950. Verkis: *Revoluciigo en konstruado kaj organizado de la urboj* (en manuskripto). Nun emerito.

Adreso: Sarajevo, Ĉemaluše 5 V

Rankoviĉ Anĝa, nask. 20. IV. 1909 en Izbište (Vrŝac), pereis en *Naciliberiga batalo* 11. VI. 1942 apud *Dumiĉ* (Gacko). *Tekslaboristino*, membro de *KPJ* de 1937, *proklamita Nacia heroo* en 1953. Esperantistiĝis en *Beograd* pere de *Dimitrije (Dize) Jovanovski ĉirkaŭ la jaro 1928* kaj fariĝis fervora esperantisto. Veninte en Vrŝac en 1932 ŝi klopodas enkonduki *Esperanton* en sindikaton.

Lit.: *Zbornik narodnih heroja Jugoslavije* p. 681

Raŝan Ĝuro, literaturisto kaj ĵurnalisto, nask. 22. IV. 1922 en *Novigrad Podravski*. *Mezlernejon vizitis* en *Virje* kaj *Koprivnica*. En 1936 fariĝis *kunredaktoro* de la tagĵurnalo »*Hrvatski dnevnik*«, *kunlaboranto* de semajnaj gazetoj »*Danica*« kaj »*Hrvatska istina*«. En 1940—1 estis *redaktoro* kaj *eldonanto* de la semajna gazeto »*Podravac*« en *Virje*. En 1942 internigita en *koncentrejon Jasenovac*.

Poemkolektoj: Lirika (1932), *Pjesme kao kapi* (1943), *Na beskrajn timerim* (1944), en manuskripto: *Podravci u priĉama i anegdotama* (kun F. V. Ŝignjar), en *Esperanto: Amaraj poemoj*.

Esperantistiĝis en 1932, skribis artikolojn pri E. en »*Danica*«, »*Hrvatska istina*«, »*Podravac*«. *Gvidis E-kursojn* en 1938, 1940 kaj 1956 en *Virje*, *Novigrad Podravski* kaj *Koprivnica*. Verkis originalajn poemojn en *Esperanto*, kelkaj aperis en *LSS* kaj en »*Reeĥoj*« (*Stafeto*).

Lit.: Stj. Banek: Pri la liriko de Ĝuro Rašan (Koprivničke novine 1933
T. Novak: Ĝuro Rašan: LIRKO (Nedjelja 1933) kaj Jožčenko: Sur senfinaj
vojoj (Hrvatski narod 1944).

Adreso: Novigrad Podravski, Gajeva ul. 114

Rehorić Zvonko, instruisto, statistikisto, nask. 24. X. 1899. en Zagreb. Instruisan lernejon finis 1919 kaj fariĝis instruisto 1921. postenis 3 jarojn en Velika Gorica, poste transiris al urba servo, fariĝis oficisto de Zagreba elektra tramo, kie li komence laboris kiel kasisto, poste kiel statistikisto, kaj kiel ĉefo de statistika sektoro emeritiĝis.

Skribis kelkajn statistikaĵojn: Saobraĉajna statistika statistike službe u gradskom putničkom saobraćaju (1954), Komercijalno-prijevozna služba (1957). Stanje i učinak gradskog putničkog saobraćaja u gradu Zagrebu (1958).

Iniciatis fondon de kulturkleriga agado, kantista koruso, teatra sekcio kaj en 1953 de E-grupo ZET.

Esperantistiĝis en 1922 kaj tuj eniris la movadon kiel komitatano de Zagreba Esperisto. Post la Dua mondmilito aktive partoprenas en restarigo de E-movado en Jugoslavio, estis vicprezidanto kaj ekde 1949 prezidanto de Kroacia Esperanto Ligo (8 jarojn). Kunlaboranto de LSS, membro de Esperanto-Instituto, E-kurso en la porinfana gazeto »Pionir«, gvidis E-kursojn kaj instruis E. en lernejoj. Organizanto de kelkaj someraj pedagogiaj E-seminarioj (Zagreb, Primošteno). Tradukis popolkantojn kaj kanzonojn, redaktas plurajn jarojn E-rubrikon en »Vjesnik ZET-a«.

Adreso: Zagreb, Kukuljevićeva ul. 58 A/III

Reja (Reya) Oskar, emerita univ. profesoro en Ljubljana, nask. 1901, doktoriĝis. Eldonis en Esperanto: La oscilado de la rivernivelejoj en sudorientaj Alpoj. Speciala presaĵo el la publikaĵo de la Instituto de meteorologio kaj geodinamiko en Ljubljana. Meteorologiaj observadoj por la jaroj 1923 kaj 1924 (Ljubljana, 1931). Tradukis el slovena lingvo teatraĵojn kaj verkis originalajn novelojn, kiuj restis en manuskripta formo.

Adreso: Ljubljana, Wolfova 8

Rijnar Izidor, nask. 9. V. 1867 en Ljubreg, mortis komence de 1955 en Ĝelekovec. Gimnazion finis en Varajdin, pedagogian lernejon en Ĉakovec kaj Zagreb (finis 1890), en 1891 instruisto en Ĉaĝavica, poste lernejestro en Ŝpišič Bukavica (ĝis 1899) kaj Ĝelekovec, kie li servis 26 jarojn. Emerita en 1928.

Esperantistiĝis en 1929 kaj fariĝis E-aktivulo en Ĝelekovec. Kunlaboris en LSS, en preparoj por la VII Jugoslavia E-Kongreso en Koprivnica 1934 kaj en ties Kongresa libreto. Posedis riĉan E-bibliotekon kiun post lia morto aĉetis la Laborista biblioteko en Zagreb.

Lit.: Nekrologo en LSS 2/1955, bildo en LSS 4/1932

Ribar Ivo-Lola, nask. 23. IV. 1916 en Zagreb, pereis trafita de malami-ka bombo 27. XI. 1943 Glamočko Polje. Studento, membro de KPJ de 1936, de 1937 sekretario de Centra komitato de SKOJ, aliĝis al Naciliberiga batalo 1941. Proklamita Nacia heroo 1944.

Li partoprenis plurajn internaciajn junularajn kongresojn (1935 en Bruselo, 1933 en Ĝenevo, 1937 en Parizo) kaj la Internacia Lingvo, kiun li lernis jam en kvina klaso de gimnazio, helpis lin tie, same en korespondado kaj interŝanĝado de poŝtmarkoj.

Lit.: Zbornik narodnih heroja Jugoslavije, Jugoslavia Fervojoj 7/1961 kaj 11/1961.

Rogelj Anton, nask. 24. VI 1940 en Ĉirĉiče apud Kranj. Finis Klasi-kan gimnazion en Ljubljana, nun doganisto en Ljubljana. Esperantistiĝis en 1953 kaj fondis grupon en Klasika gimnazio (estis prezidanto), en 1958 kunlaboris en la 1-a Esp. junulara laborbrigado »Dušan Maruzzi« (estis anstataŭanto de komandanto). Kiel poeto prezentis dum la II. Slovenia E-Festivalo (2 k 3 premio). Lia poemo aperis en poemaro »Reeĥoj« (Stafeto).

Adreso: Ljubljana, Vodnikova 44.

Rot (Roth) Simon, nask. 19. IX 1913 en Nadalj (St. Beĉej), mortigita en koncentrejo Osvjencim 1944. Blindulo, elementan lernejon kaj gimnazion finis en Budapeŝto, studis filozofion en Anglujo, kelktempe pasigis en Blindula domo en Zemun, parolis 9 lingvojn. En sia infanaĝo konatiĝis kun Esperanto, gvidis E-kursojn en St. Beĉej kaj en Budapeŝto, partoprenis plurajn landajn kaj internaciajn E-kongresojn, kunlaboris en LSS.

Rotkviĉ Ivo, nask. 23. X 1901 en Mostari apud Ĉazma. Juristo, akademiano, unu el la plej elokventaj E-oratoroj kaj plej bonaj esp. stilistoj. Sian junaĝon pasigis en Bjelovar, ĉe la fino de la I mondmilito la familio translokiĝis al Zagreb, kie li finis gimnazion kaj juran fakultaton. Nun laboras ĉe Kroata naturscienca societo en Zagreb.

Agado por Esperanto: Esperantistiĝis en 1921, estis ĉefa kunlaboranto de d-ro D. Maruzzi, longjara sekretario de la Zagreba Esperanto-societo, unu el ĉefaj organizintoj de la unua jugoslava E-kongreso (1923) kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo, kie li sekretariois dum pluraj jaroj; kunlaboranto en la Sudslava Esperanto-Servo, kelkajara redaktoro de »Konkordo« kaj kunredaktoro de la »Balkana Konkordo«.

Kiel bona oratoro li faris multajn paroladojn pri Esp. en diversaj urboj kaj akiris famon en tuta Esperantujo, kie li dum kongresoj per siaj paroladoj lasis profundan impreson. Lia amata okupo lingvistiko. Pro granda sperto en lingvaj problemoj elektiita Lingva komitatano (1936) kaj membro de la Lingva akademio (1946). Konata laŭ tradukoj el la kroata literaturo. Per traduko de »Cezaro« de M. Jeluŝiĉ li malfermis novajn vojojn kaj akiris famon de unu el la plej bonaj esp. tradukantoj. Post la I mondmilito gvidis multajn kursojn, skribis multajn artikolojn en naciaj gazetoj. Li estas vicprezidanto de la Internacia Asocio de verkistoj esperantistoj.

Verkoj: Hrvatsko-srpski esperantski rječnik (kune kun d-ro D. Maruci, Zagreb 1924), Aŭtuna vespero de D-ro Milan Ogrizoviĉ (traduko, Zagreb 1924), Pangea la sola ebla eliro el la mondkrizo de Rudolf Herceg (traduko, Köln 1932), romano »Gezaro« de Mirko Jeluŝiĉ (trad. el la germana kaj kroata, Zagreb, 1934), Tragedio en la Universo (reverko, Zagreb 1963); paroladoj »Literaturo kiel eduka rimedo« (en »Esperanto kaj lernejo«, Ljubljana, 1959), festparolado en Varsovio dum la 44-a U. K. en LSS 4/1959.

Lit.: Enciklopedio de Esperanto; Biografio kun bildo en LSS 6/1951

Adreso: Zagreb, I Cvjetno naselje 21

Rubĉiĉ Rudolf, nask. 18. XI 1884 en Zadar, mortis 13. V 1951 en Split. Elementan lernejon kaj gimnazion finis en Dubrovnik, juran fakultaton en Grac (diplomiĝis 1910). Ekpostenis kiel juristo en Zadar 1912 ĉe Poŝtdirekcio, de 1919 vivas kaj postenas en Split.

Esperantistiĝis en Grac en 1907, en 1922 li gvidas en Split la unuan E-kurson, fariĝas prezidanto de novefondita societo, en 1924 li prezidis la II. landan E-kongreson en Split. Li estis komitatano de la landa E-organizo. Havis grandajn meritojn por disvastigo de Esperanto ankaŭ en aliaj lokoj de Dalmatio. Korespondis enlande kaj eksterlande kun meritplenaj s-anoj.

Lit.: nekrologo en LSS 3/1951

Glavni i odgovorni urednik Antonije Sekelj